1982 aprilo
75-a jaro
n-ro 916 (4)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Tridek movadaj jaroj de la kastelo Grésillon

Vi trovos

ankaŭ en ĉi tiu malfrua revunumero amaseton da ideoj kaj ekzemploj, kiel sukcese agadi por la Internacia Lingvo. Ne demandu nun, kie estas tiuj ideoj kaj ekzemploj. Legu atente, kaj vi malkovros ilin preskaŭ sur ĉiu paĝo. Se vi insistas, jen helpo tiurilate: Kion vi planas por 1983 kaj la Monda Komunika Jaro (p.61)? Ĉu vi fariĝos almenaŭ aĉetanto de unu el la 25 libroj, kiujn planas eldoni UEA (p.62)? Se en viaj loko kaj lando ne eblas tiel sukcese varbi hidrometeologojn por Esperanto (p.63), kial ne provi ĉe kamentubaj purigistoj, ĉe monaĥinoj aŭ ĉe profesiaj rizplantantoj? Vi ne povas nun subite vojaĝi al Afriko, kiel faris Golden kaj Tarrant (p.64), sed provu rezigni pri unu guldeno aŭ pri unu Esperanta libro favore al la Fondaĵo Azio-Afriko. Emmanuel Chicot efektive interesiĝas pri viaj komentoj por la kolokvo en novembro (p.65), do skribu! Kaj tiel plu. Kaj denove same aŭ simile. Ni petas, proponas, instigas. Jes. Ni ne estas en ĉi tiu Movado por sidi. Necesas moviĝi. Cetere, laboro tenos vin svelta kaj sana. Ĝis majo, kun pli da ekzemploj kaj ideoj!

Enhavo

61 1983 – Monda Komunika Jaro: Evoluo de la substrukturoj de komunikado (Humphrey Tonkin)
62 Kunsido de la Estraro de UEA: Dudeko da novaj libroj en preparo (sm)
63 Faka agado: Amaso da hidrometeologoj (N. Nikolov)
64 Reagoj: Afriko – ankoraŭ tro verda por la "verda venko" (Bernard Golden)
65 Kolokvo pri komunikado: Ankaŭ vi povas kunhelpi! (E. Chicot); Aŭkcio en Antverpeno: Favore al Fondaĵo Canuto
66 Tridek jaroj de la Kastelo Grésillon: Internacia esperantista kulturdomo en Francio (Audrey C.E. Childs-Mee)
68 "La litomiŝla tombejo" de Karolo Piĉ: Pri kio (mal)entuziasmas Juan Régulo Pérez (J. Régulo Pérez)
70 Iniciatoj: Rubriko pri vilaĝa vivo
Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 67a Universala Kongreso en Belgio)
71 Recenzoj: "La sonetoj" de Shakespeare / W. Auld (Leopoldo Knoedt); "Brazilaj geografiaj nomoj" de D. Pereira de Souza (J.M. Mabesoone); "Ho ve, miaj ŝuoj!" de G. Fröschel / B. Lindeberg (Klaus Schubert); "Makedonaj popolaj rakontoj" de J. Velebit kaj S. Šimunić (C. Dominte); "Hajka antologio" de M. Miyamoto kaj M. Ueyama (Mauro Nervi); "Fabeloj de la verda pigo" de L. Beaucaire (Ivo Železný); "Rakontoj el unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo" de Karel Čapek / J. Vondroušek (M. Nervi); "Infanpsikologio; Elektitaj temoj" de Margarete Landmark (Roberto Lloancy); "Vibraj momentoj" de J.H. Rosbach (B. de Wit)
75 Laste aperis. . . (novaj libroj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
76 TEJO-paĝo: Labortendaroj: Por esti utila kaj lerni (Martin Haase); Landaj sekcioj: Duafoje estos pli bone; 38a TEJO-kongreso: UK por IJK
77 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
78 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
79 Anoncetoj; Anoncoj
80 Esperanto en radio

La kovrilo

Antaŭ la Dua Mondmilito, la plej fama movada domo estis tiu en la nederlanda urbo Arnhem. Vi trovos pri tio informojn en "Enciklopedio de Esperanto". Kiam aperos "Nova Enciklopedio de Esperanto" (vidu p. 63), tie ne rajtos manki ampleksa prezento de la plej fama postmilita movada domo – la Kastelo Grésillon, pri kies 30-jara jubileo ni raportas sur la paĝoj 66 kaj 67. Post la definitiva fermiĝo de Internacia Altlernejo en Elsinoro (Danlando), Grésillon nun estas la plej granda kaj la plej konata feria lernejo en la Esperantomovado. Ĝia plej serioza konkuranto por tiu honora titolo fariĝas la Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds (Svislando).

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono**: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Maandelijks tijdschrift "esperanto", nr. 916 (4), april 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, België

Evoluo de la substrukturoj de komunikado

”LA KVAR ĈEFAJ PROBLEMOJ, kiujn frontas la mondo hodiaŭ, estas la batalo kontraŭ malsato, la lukto kontraŭ neevoluinteco, la fortigo de la paco kaj la batalo kontraŭ nescio.” Per tiuj vortoj s-ro M. Mili, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio (ITU), komencas sian enkondukon al la nove eldonita gvidilo de ITU pri realigo de la programo de la Monda Komunika Jaro.

Liaj vortoj estas gravaj, ĉar ili emfazas la fakton, ke la problemo de monda komunikado, laŭ sia karaktero, ne estas tute simila al la aliaj grandaj problemoj, kiujn la homaro devas solvi en la hodiaŭa kaj morgaŭa epokoj. Malsato, malriĉo (ĉar tion s-ro Mili ĉefe celas per la vorto ”neevoluinteco”), malpaco kaj nescio estas forigendaj bazoj de la homa mizero. Sato, sufiĉo, paco, scio, estas celoj en si mem.

Sed komunikado ne estas en si mem celo: ĝi estas perilo. En tiu senco ĝi estas eĉ pli esenca problemo – ĉar sen la perilo de la komunikado, la homaro ne povas sin direkti al solvado de la aliaj bazaj mondaj problemoj. Efika komunikado estas esenca antaŭkondiĉo de la paco, de sufiĉo, de ĉio, kio levos la vivon de la homoj super la nivelo (aŭ, tro ofte, **ĝis** la nivelo) de nura ekzisto.

Televidilo alvenas en proksimorientan urbon: La tekniko ebligas vidi kaj aŭdi, sed ĝi ne respondas la demandon kiel kompreni. (Foto el ”Unesko kuriero” de Bruno Barbey)

La decido lanĉi Mondan Komunikan Jaron ne okazis sen antaŭaj perturboj. La ideo estis unue levita en la kadro de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, Ekosok, kiu jam prenis sur sin respondecon pri gvidado de Jardeko pri Transporto kaj Komunikado en Afriko, kies programoj realiĝas jam de 1978. Timante la kostojn de la nova propono kaj maltrankvilante pri ĝiaj iom vastaj celoj, la ŝtatoj-membroj resendis al la Sekretariato de UN la unuan proponon. Ĝi revenis en 1981, en pli malvasta formo, kaj, post aprobo ĉe Ekosok, ĝi estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en novembro 1981. La tasko realigi la programon de la Jaro estis donita al ITU.

Jam per tiu decido la Ĝenerala Asembleo klare indikis la ĉefan emfazon de la Jaro: ĝi emfazas unuavice la komunikan teknologion, tiun aron da sciencaj eltrovaĵoj, kiu eksplode revoluciigis en la lastaj jaroj la formojn kaj la intensecon de komunikado en – kaj inter – precipe la industriaj landoj. Estas ankaŭ grave noti – kaj la laborprogramo de ITU reemfazas la fakton – ke la Monda Komunika Jaro ne estas **jaro pri monda komunikado**, sed **monda jaro pri komunikado**. ”La ĝenerala agado de la Jaro estas direktita,” asertas la laborprogramo de ITU, ”al specifaj atingoj je la **nacia** nivelo.”

Aliflanke, la vortoj de s-ro Mili, kaj la sentoj esprimitaj tie kaj jene en la debatoj pri la Jaro, klare montras, ke li kaj liaj stabanoj funde komprenas, ke la homa kaj organiza dimensioj de la komunikado estas egale esencaj, eble eĉ pli esencaj, ol la fizika maŝinaro komunikada. Pro tio la Jaro emfazas substrukturojn – tiujn bazajn organizajn rimedojn, tiujn home kreitajn instituciojn, sen kiuj la maŝinoj de la komunikado estas senpovaj. Kaj malgraŭ tio, ke la ĉefa emfazo de la Jaro direktiĝas al la nacia agado, multaj aspektoj de naciaj komunikoretoj estas efektive internaciaj laŭ siaj karakterizoj kaj implicoj – kaj unu el la ”celoj” de la Jaro specife rekonas tion:

”Starigo de monda komunika reto konsistigos grandan historian atingon, kongruan al ekapero de kolektiva konscio inter la homaro kiel tuto. Post ĝia starigo, neniu bezonos esti plu izolita for de la nacia aŭ internacia komunumo. Monda Komunika Jaro montros

kiel gravas tiu atingo por la realigo de la celoj de la UN-sistemo . . . por la bono de la homaro kiel tuto."

En la debatoj lige kun la lanĉo de la Jaro, neniu ŝtato aŭ UN-instanco, ŝajne, levis la lingvan demandon. Kiel estas klare konstateble en la internacia debato pri informado kaj komunikado, kiu okupas la atenton de Unesko kaj UN jam kelkajn jarojn, oni emas apartigi la du problemojn, kvazaŭ la lingva demando ne fundamentus la komunikadon, sed estus iel ignorebla. UEA per ĉiuj siaj fortoj (kaj ne tute sen sukceso) kontraŭbatalas tiun antaŭjuĝon. Ĝi daŭrigos siajn tiurilatajn klopodojn ankaŭ en la kunteksto de la Komunika Jaro.

Kian rolon, do, ludu UEA en la laboroj de la Monda Komunika Jaro? En la venontaj monatoj, tiu demando certe okupos la atenton de ĝiaj gvidaj organoj kaj espereble kondukos al diversaj definitivaj decidoj dum la Universala Kongreso en Antverpeno. Jam kelkaj decidoj estas faritaj. Kiel jam konate, UEA kaj aliaj neregistaraj organizaĵoj komune realigos (je iniciato kaj gvido de UEA) kolokvon pri kulturo kaj amaskomunikado – ĉe Unesko en novembro. Krome, la Estraro de UEA jam decidis, ke la Universala Kongreso en 1983 estos ĉefe dediĉita al esplorado de la rilatoj inter lingvo kaj komunika teknologio. La jaro 1983 estos ankaŭ la jaro de lanĉo de la kvinjara agadplano por la Jubileo de Esperanto, kiu kulminos per la centjariĝo en 1987. En tiu unua jaro, **la Aso**cio donos apartan atenton al la celoj de la **Monda K**omunika Jaro.

Sed aparte gravos enlandaj iniciatoj lige kun la Jaro. Pro tio, ke la Jaro emfazos naciajn komunikajn strukturojn, nature ĝia laboro realiĝos ĉefe pere de naciaj komitatoj, kiujn la diversaj landoj nun fondas. Estas ege grave, ke la landaj Esperanto-asocioj starigu kontakton kaj kunlaboron kun tiuj naciaj komitatoj. Jam ITU aperigis sian unuan liston de enlandaj kontaktpersonoj, kaj pliaj listoj sekvos. Ĉefe temas pri ministeriaj funkciuloj en la diversaj landoj. UEA volonte donos la nomojn kaj adresojn de la koncernaj personoj al tiuj landaj asocioj, kiuj petas.

En nia kontakto kun naciaj instancoj, samkiel en niaj internaciaj kontaktoj, ni emfazu unuavice la kunlaboron. Bedaŭrinde eĉ multaj homoj de bona volo ne plene komprenas, ke lingva interrilato estas en si mem unu el la bazaj **sociaj institucioj**, aŭ substrukturoj, de la komunikado. Necesos do zorga kaj ĝentila persvadado – unue, ke la naciaj komitatoj sin okupu pri la lingva demando, kaj, due, ke ili traktu kun la esperantistoj, kiuj en multaj landoj estas relative nekonata socia movado. Necesos, do, pacienco, obstino kaj saĝo.

En la venontaj monatoj, la preparlaboroj por la Monda Komunika Jaro troviĝos ofte en la atento de niaj membroj. Sukcesa realigo de la planoj de UEA kaj ĝiaj landaj kaj fakaj asocioj povus esti decida elemento en la antaŭenigo de la Internacia Lingvo en la jubilea periodo.

Humphrey Tonkin

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE UEA:

Dudeko da novaj libroj en preparo

LA ESTRARO de UEA ne kunvenis en sia plena konsisto de post aŭgusto pasintjare en Brazilo. Kiel ni menciis en nia januara numero, meze de novembro 1981 renkontiĝis kvin estraranoj dum la Seminario pri Planado en Berlino, kaj traktis kelkajn urĝajn demandojn. Tamen, tiu preskaŭ okmonata intervalo sen plena kunsido ne signifas mankon de laboro: la estraraj korespondkostoj en 1981 superis la sumon de ses mil gld. Cetere, oni tiel longe ne kunsidis pro buĝetaj kialoj. Vi povas imagi, ke la internacieco (aŭ interkontinenteco) de la Estraro havas ankaŭ gravajn financajn sekvojn.

En la nuna estrarkunsido, inter la 19a kaj 21a de marto en Roterdamo, ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, kelkaj oficistoj el Roterdamo kaj Antverpeno kaj s-ro Ian Jackson el Londono, kiel reprezentanto de TEJO. Denove por ŝpari, nur tri estraranoj loĝis en hotelo (malmultekosta), kaj la aliaj tranoktis, ĉu en libera volontula ĉambro en la Oficejo, ĉu ĉe oficistoj de UEA.

Oftaj kunmetantoj de kunsidaj tagordoj scias, ke ĉiam mankas tempo por funde pritrakti la lastajn erojn de la tagordo. Por ke tio ne ĉiam trafu la samajn laborkampojn, la Estraro nun iom inversigis la tagordon, tiel ke la unuaj eroj en la kunsido estis tiuj pri kulturo kaj edukado. Ĝuste tie oni rimarkas plurajn pozitivajn evoluojn lastatempe. La Estraro nun akceptis Regularon pri la Elementa kaj Meza Ekzamenoj de UEA, kaj tiuj internacikarakteraj ekzamenoj ekfunkcios en 1983. Estas akceptita ankaŭ 7-membra Internacia Ekzamena Komisiono, kiun eniris: Edwin de Kock (Sud-Afriko), Geraldo Mattos (Brazilo), Gerald Tucker (FR Germanio), Tacuo Huĝimoto (Japanio), Irena Szanser

REDAKTORO POR LA ELDONA FAKO DE UEA

Por rapidigi sian eldonan agadon, UEA serĉas redaktoron por la Eldona Fako. Taskoj: prizorgi la korespondadon pri la eldonotaj libroj, inkluzive de kontraktoj, lingva kontrol(ig)o kaj teknika redaktado. Honorario interkonsentota. Kandidatoj (kiuj prefere loĝu en la proksimeco de Nederlando) petu detalan demandaron de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

(Pollando), Douglas F. Coates (Britio) kaj Árni Bödvarsson (Islando). Iam poste en ĉi tiu jaro, ni revenos al la temo de la ekzamenoj, por detale klarigi kiel ili funkcias.

Sed tio, kio ĉefrolis en la marta kunsido, estis tamen alia labortereno. Ne temis pri la financaj demandoj, kvankam ili ja postulas grandan atenton de kunsido en kiu la Estraro diskutas la pasintjarajn rezultojn. Ankaŭ la kongresaj temoj ne altiris la ĉefan atenton, kio estus normala en la lasta antaŭkongresa kunsido. Ĉefrolis ĉi-foje – laŭ nia persona juĝo – la eldona agado de UEA. Vi certe scias, ke UEA en la lastaj jardekoj ne apartenis al la plej viglaj movadaj eldonistoj. Aperis sub ĝia nomo pli-malpli po unu libro en du aŭ tri jaroj. Nun la marta estrarkunsido diskutis pri entute 25 novaj libroj, kiuj estas en la aktuala eldonplano de UEA! Vi do komprenas, kial la Asocio nun bezonas apartan gvidanton de la Eldona Fako (vidu anoncon apude).

Kiuj estas ĉiuj ĉi libroj, subite kaj en tiaj kvantoj? Grandparte temas pri la unuaj rezultoj de la laboro de la pasintjare inaŭgurita Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto. Pluraj el la titoloj en tiu eldona plano estas ankoraŭ relative malproksimaj de vera prespreteco kaj baldaŭa eldoniĝo. Se ni mencias kelkajn titolojn, vi povos imagi pri kio temas kaj kiom da preparlaboro tiaj verkoj postulas: *Vetero kaj klimato de la mondo*, *Kompendio de la organika kemio*, *Naturscienca poŝenciklopedio*, *Ĉu vi konas la Teron?* ktp. Aliflanke, aldoniĝas ankaŭ la kapacitoj de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno. Inter la titoloj, kiujn oni de tie povas atendi dum ĉi tiu jaro estas: legolibro verkita de d-rino M. Boulton, internacia lernolibro de A. Slanina, la romano *Kiuj semas plorante*, kiu gajnis la Premion Raymond Schwartz antaŭ du jaroj, kaj esperantologia volumo de la pasintjare mortinta A.D. Atanasov. Preskaŭ tute preta estas la manuskripto de la nova eldono de *Esperanta antologio*, en redakto de W. Auld, presota en Ĉinio. Ŝajnas, ke UEA troviĝas ĉe la sojlo de lanĉo de alia granda eldona projekto – *Nova Enciklopedio de Esperanto*. Detaloj pri tio devus klariĝi ĝis la antverpena UK, kaj oni esperas, ke la volumego mem povos aperi antaŭ 1987.

Neatendite, la Estraro frontis kelkajn formalajn problemojn pri la antaŭvidita okazigo de la 68a UK en Budapeŝto venontjare. Tuj post la kunsido flugis tien s-ro Diccon Masterman (40-jara brito, kiu en decembro 1981 transprenis la funkcion de la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA) kaj provis atingi solvon pri tiuj principaj problemoj. Laŭ postkunsida decido, ni ja kongresos en Hungario en 1983. Sed, se la plej proksima el la venontaj Kongresoj eĉ donas problemojn, en la postaj kongresurboj – Vankuvero (1984) kaj Aŭgsburgo (1985) jam viglas preparlaboroj. Por la UK en 1986 forte interesiĝas Pekino, en 1987 oni esperas povi kongresi en Varsovio, kaj por 1988 venis invito el Aŭstralio.

En nia maja numero aperos la Estrara Raporto pri la agado en 1981. Akompanos ĝin ankaŭ la kutimaj financaj superrigardoj. Vi vidos tie, ke la pasintjaraj spezoj sukcesis konservi ekvilibron inter la kostoj kaj rimedoj. En la nuna malfacila ekonomia situacio tutmonda – kiu kompreneble trafas ankaŭ nian Asocion – tia financa rezulto de 1981 povas esti kvalifikita kiel sukceso.

sm

FAKA AGADO:

Amaso da hidrometeologoj

EN SOFIO, ĉe Bulgara Hidrometeologia Servo, kvindeko da hidrometeologoj fervore lernas Esperanton. En la fondita Esperanto-klubo membras 65 personoj, kiuj serioze okupiĝas pri la disvastigo kaj aplikado de la Internacia Lingvo en ĉi tiu fako. Ili starigis antaŭ si la malfacilan sed realigeblan taskon – fondi, kunlabore kun alilandaj Esperanto-organizaĵoj, similajn klubojn ĉe kelkaj landaj hidrometeologiaj servoj. Krom tio, oni sondas eblecojn por – post 5-7 jaroj – konvinki Mondan Meteologian Organizaĵon utiligi Esperanton en sia agado.

Kiamaniere ni atingos tion? Certe, multaj legantoj ekridetos legante pri niaj grandaj planoj kaj celoj. Ili havas la rajton dubi, ĉar estas konate, ke sciencistoj estas ege okupitaj kaj ne emas dediĉi sian valoran tempon por lerni Esperanton, pri kiu ili apenaŭ ion scias.

Tia estis la situacio, antaŭ kvar jaroj, ankaŭ en Bulgara Hidrometeologia Servo. Sed post intensa kaj lerta agado, utiligante novajn metodojn kaj modernajn informilojn, rezultoj venis.

Eksciinte, ke de la 20a ĝis la 25a de septembro 1982 en Sofio okazos internacia konferenco pri defendo kontraŭ hajlo, mi konvinkis la organizantojn aldoni al la dokumentoj de la konferencanoj nacilingvajn prospektojn pri Esperanto. Krome, ni akiris permeson aranĝi tie Esperanto-ekspozicion. Tio estas realigebla, se Esperanto-organizaĵoj sendos al nia klubo la necesajn nacilingvajn informilojn. Ni bezonas ankaŭ esperantaĵojn por la aranĝota ekspozicio.

Poste, ni intencas kunvoki en Sofio internacian konferencon pri agrometeologio. Tiu konferenco utiligus Esperanton en sia laboro. Ni bazas tion je la fakto, ke kvar agrometeologoj, niaj membroj, kaj la direktorino de nia komputila centro (ŝi nun lernas la lingvon) estas pretaj partopreni la konferencon kaj prelegi. La konferenco okazos, se minimume 6-7 alilandaj fakuloj ĝin partoprenos.

Por la disvastigo de Esperanto en la hidrometeologio ni aranĝos vojaĝojn de niaj klubanoj al iliaj kolegoj en aliaj landoj. Baldaŭ ni renkontiĝos kun kolegoj en Slovakio kaj Hungario.

Oni sendu materialojn al: Bulgara Hidrometeologia Servo, Klubo Esperanto, Bul. Lenin 66, BG-1184 Sofia, Bulgario.

N. Nikolov

Afriko — ankoraŭ tro verda por la "verda venko"

L A ARTIKOLO de Ian Tarrant titolita "Ili ne bezonas la kvinan lingvon" (*Esperanto*, marto 1982, p. 45-46) enhavas iom da pravo, kiu meritas emfazan ripetadon, kaj iom da malpravo, kiu bezonas ĝustigon. Ankaŭ al mi, post tri kaj duona jaroj da restado en Afriko, oni ofte faris la demandon: "Ĉu vi sukcesis starigi Esperanto-grupon?" Mi priskribis miajn spertojn en artikolo aperinta en *Esperanto* (majo 1979, p. 94-95), do mi ne ripetos la detalojn tie ĉi. Mi respondis preskaŭ same kiel Tarrant. Por afrikanoj nuntempe, kroma lingvo kiel Esperanto estas nur superflua balasto. Tia lingvo tute ne utilus al ili pro la identaj kialoj, kiujn Tarrant listigis, kaj tiuj samaj kialoj validas ankaŭ en pluraj aliaj partoj de la ekstereŭropa mondo. Bedaŭrinde, tro entuziasmaj propagandistoj aŭ ne konscias pri tio, aŭ intence prisilentas tiujn fortajn argumentojn.

Ĝis tiu punkto mi samopinias kun Tarrant, kiu, malgraŭ ĉio, persiste serĉas kialon por eksporti Esperanton al Afriko, bazante sian motivon sur "niaj movadaj kontraŭargumentoj". Mi konas ilin, kaj miaopinie ili estas tre malfortaj. Ne havas sencon ĝistede marteladi la temojn de lingva imperiismo, koloniismo kaj usoneco (kiel povis okazi, ke la verkinto de la koncerna artikolo preteratentis la britecon, kiu ja estas multe pli forta imperiisma faktoro ol la usoneco en la orienta Afriko?). Kvankam li mem konfesas, ke "tia argumentado sonas mallaŭte tie", li tamen proponas, ke esperantistoj kontraŭbatalu per reklamkampanjo. Jen tre granda eraro, ĉar la nuna reklamado (aŭ informado aŭ propagandado) pri Esperanto en Afriko valoras nenion.

Kiam estis preparita la broŝuro *Por defendo de afrikaj kulturoj*, mi detale kritikis la enhavon de la angla kaj franca versioj, sed malgraŭ tio, ili estis eldonitaj. Mi supozas, ke la sŭahila traduko enhavas la samajn malleŕte prezentitajn argumentojn. Sendi tiajn broŝurojn, cirkulerojn kaj leterojn al Afriko signifas malŝparon de papero. Montriĝis maltrafa ankaŭ la vojaĝado de fervoruloj al tiu kontinento, ĉar ili sukcesis veki nur provizoran interesiĝon pri Esperanto. Lastatempe preparas sin por nova fiasko organizaĵo en Zagrebo, kiu intencas instrui Esperanton al afrikaj studentoj en Eŭropo. Ankoraŭfoje oni ĵetos monon, ĉar kiam tiuj junaj homoj reiros al siaj hejmlandoj, ili devos okupiĝi pri multe pli gravaj problemoj ol la fondo de Esperanto-grupoj. Ankaŭ la anoncoj aperintaj kaj aperontaj en sŭahila ĵurnalo ne estas efikaj. Se oni volas per gazetreklamado instigi afrikanojn al la lernado de Esperanto, oni publikigu ĉi-specan sciigon: *Firmao X serĉas homojn por oficoj donantaj bonan salajron. Dungotoj ricevos stipendion por plua trejnado en Eŭropo aŭ Ameriko. Anoncu vin, nur se vi havas bonan scion de Esperanto.* Jen kiel oni efektivigos la verdan venkon en Afriko.

Bernard Golden

REDAKCIA NOTO: Nu, ni malkonsentas kun Golden, ĉar li implicite proponas, ke "ni sidu kaj atendu". Li erare ĝeneraligas la sintenon de afrikaj intelektuloj kaj prezentas ĝin kiel tutkontinentan trajton. Li forgesas, ke la idealoj de Esperanto trovas pli fekundan grundon ĝuste ekster la konsumismaj socioj de Eŭropo kaj Ameriko. Rigardu Sud-Amerikon! Rigardu Hindan Union aŭ Ĉinion! Ne estas malpli utopie veki interesiĝon pri Esperanto en Afriko, ol provi kontraŭbatali antaŭjuĝojn pri ĝi en Eŭropo, ol instrui al usonanoj kaj eŭropanoj, ke iliaj naciaj lingvoj ne estas akceptеblaj por internacia komunikado en sendiskriminacia mondo de morgaŭ. Aperigi anonceton en Kenjo aŭ sendi broŝuron tien estas malpli granda monforĵeto, ol skribi al parlamentanoj kaj sendadi al ili broŝurojn, kiujn ili ne legas. Tarrant estas juna kaj entuziasma. Li volas fari ion – kaj ne malprudente. Ni eĉ ne provu infekti lin per nia skeptikismo.

Multaj problemoj por solvi hodiaŭ, sed necesas lerni ankaŭ por morgaŭ: Vilaĝa lernejo en Tanzanio (Foto: J. Kirknaes).

KOLOKVO PRI KOMUNIKADO:

Ankaŭ vi povas kunhelpi!

LA KONFERENCO de la Neregistaraj Internaciaj Organizaĵoj (NROj) en konsultaj rilatoj kun Unesko, okazinta dum junio 1981, aprobis du rezoluciojn pri la problemoj de komunikado. Unu el ili estis prezentita de la delegacio de UEA ĉe Unesko. Tamen, ambaŭ rezolucioj proponis la organizon de kolokvo por studi plurajn aspektojn de tiuj problemoj. En oktobro 1981, la Konstanta Komitato de la NROj aprobis sian programon por la venonta trijara periodo kaj decidis organizi kolokvon pri komunikado en novembro 1982.

Preparos tiun kolokvon la jam ekzistanta laborgrupo de la NROj pri komunikado (ĝin gvidas la reprezentantoj de UEA ĉe Unesko) kaj la kolokvon mem pretigos UEA kaj du aliaj NROj: Monda Konsilio por Paco kaj Internacia Konsilio pri Kino kaj Televido.

En sia unua kunsido, la laborgrupo aprobis por la kolokvo la jenan temon: "Kultura komunikado: mesaĝoj de amaskomunikiloj, enhavo kaj strukturoj", kaj ĝi precizigis, ke oni aparte atentu la transsendon de la mesaĝoj per "bildoj kaj vortoj" kaj la edukon de la publiko koncerne amaskomunikilojn. Kompreneble, la reprezentantoj de UEA substrekis la lingvan aspekton de tiuj problemoj kaj ĉefe la lingvajn obstaklojn al internacia transsendo de mesaĝoj. La tutan temon de la kolokvo oni studu el internacia vidpunkto.

Por prepari la kolokvon, la laborgrupo decidis sendi demandaron al ĉiuj neregistaraj internaciaj organizaĵoj en rilatoj kun Unesko. Inter tiuj demandoj, jenaj ŝajnas al ni aparte gravaj:

– Ĉu vi opinias, ke la diversaj kulturaj programoj, elsendataj de la vialandaj televido kaj radio, respektas – ĝenerale – la tradicion kaj valorojn de viaj nacia, regiona kaj loka kulturoj?

– Ĉu la aliaj landoj en via televido estas plej ofte adekvate prezentataj?

– Ĉu laŭ via opinio difinitaj programoj en radio kaj televido kontribuas al la firmiĝo de la spirito de Paco? Kiuj programoj tio estas? Ĉu vi opinias, ke – male – aliaj programoj instigas al agresaj kaj militaj starpunktoj?

– Ĉu vi kredas, ke radio kaj televido povas kontribui al la edukado ĝenerale, kaj precipe al la edukado pri la homaj rajtoj?

– Ĉu al vi ŝajnas, ke iuj elsendoj estas kapablaj helpi en la solvado de unuopaj problemoj?

– Ĉu la spektantaro povas, laŭ via opinio, esti edukita kritike rilati al la sona kaj bilda amaskomunikiloj?

Laŭ propono de la reprezentantoj de UEA, la demandaron eniris ankaŭ ĉi tiuj du eroj:

– Kion vi opinias pri la eblecoj disvolvi dialogon inter diversaj kulturoj pere de radio kaj televido?

– Kion vi opinias pri la lingvaj aspektoj de la kultura komunikado kaj pri la obstakloj kiuj leviĝas sur tiu kampo?

La subskribinto esperas, ke la legantoj konscias pri la graveco de ĉi tiuj demandoj kaj de la okazonta kolokvo. Tial estus tre bonvenaj komentoj, precipe de specialistoj sur la kampo de komunikado. Estus interese ricevi opiniojn ne nur pri la lastaj du demandoj sed ankaŭ pri la aliaj, kiuj ne rekte tuŝas la agadkampon de la Esperanto-movado. Per alsendo de la komentoj oni grave helpos la partoprenon de UEA en la kolokvo de Unesko, en novembro ĉi-jare. Sendu ilin al:

Emmanuel Chicot,
40 square des Marronniers
F-78870 Bailly, Francio

AŬKCIO EN ANTVERPENO:

Favore al Fondaĵo Canuto

TUTE SENDEPENDE de tio, ĉu vi mem iros al la Universala Kongreso aŭ ne, vi povas kontribui al la sukceso de la aŭkcio, kiun ĉi-jare UEA denove organizas en la sino de la Kongreso. Dum tiu aŭkcio (kiun gvidos nia antaŭa prezidanto, Humphrey Tonkin), UEA disvendos multajn objektojn ligitajn al Esperanto kaj esperantistoj – librojn (inkluzive de multaj raraj kaj tre valoraj), malnovajn kongresaĵojn (insignojn, kartojn, ktp), poŝtkartojn kaj specialajn kovertojn, Esperantajn poŝtmarkojn kaj alispecajn filatelaĵojn, malnovajn fotojn, rarajn revukolektojn, diversajn objektojn de famaj esperantistoj ktp. ktp.

Se vi posedas tiajn aĵojn kaj pretas kontribui ilin al la aŭkcio, ni estos aparte dankaj. Ni urĝe bezonas taŭgajn malnovaĵojn de plej diversaj specoj. Eble tio kion vi posedas ŝajnas al vi nevendebla. Tamen, d-ro Tonkin jam montris en Brazilio, ke li kapablas eĉ tute neverŝajnajn objektojn vendi. **Sendu viajn objektojn kiel eble plej baldaŭ al la Centra Oficejo en Roterdamo**, aŭ kunportu ilin al Antverpeno. Prefere estus anticipe sendi ilin, tiel ke ni povu ĉion listigi kaj enordigi antaŭ la aŭkcio mem. Indiku klare sur eventuala pakaĵo, ke ĝi estas destinita al la aŭkcio. Skribu sur la pakaĵon la impostan kodon de UEA – BTW 427/2770076 B 01 – ĉar tio helpas solvi doganajn formalaĵojn.

Kaj se vi ĉeestos en Antverpeno, nepre venu al la aŭkcio. Ĉi-jare la tuta mono gajnita en la aŭkcio iros al la Fondaĵo Canuto, por helpi homojn el la Tria Mondo kaj el landoj kun transpagaj problemoj aliĝi al UEA. Nuntempe, kiam tiuj transpagaj problemoj multiĝas por pluraj landoj kaj kiam agado en la Tria Mondo intensiĝas, via helpo estas aparte bezonata. Por tiel nobla celo vi certe povas kaj pretas donaci ion, kion vi eventuale eĉ ne bezonas, pri kies posedo vi ĝis nun apenaŭ konsciis. Antaŭdankon!

Internacia esperantista kulturdomo en Francio

Kastelo Grésillon, Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, kompletigas ĉi-jare tri jardekojn de sia unika rolo en la franca kaj internacia Esperanto-movado. Aĉetita por la sumo de 40 000 francaj frankoj, ĝi nun valoras ĉ. 1 500 000 (ĉ. 650 000 gld). Eĉ se oni kalkulas ĉiujn inflaciajn elementojn dum la lastaj tridek jaroj, neevitebla konkludo estos, ke temis pri unu el la plej bonaj investoj en la lastatempa movada historio. Okaze de la jubileo, ni petis s-inon Childs-Mee, kiu de pluraj jaroj estas regula gasto kaj instruanto en Grésillon, verki por niaj legantoj la sekvan prezenton de tiu unika institucio de la nuntempa Esperanto-movado.

LA 16an DE SEPTEMBRO 1951, fondiĝis en Parizo la koopera asocio Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj. Ĝia celo estis aĉeti domon, kiu fariĝos pedagogia kaj kultura centro por esperantistoj de Francio. La iniciatinto kaj ĉefarĥitekto de la ambicia plano el kiu naskiĝis la Asocio estis Henri Micard (elparolu: anri mikar). Al li la asocia membraro komisiis la taskon aĉeti taŭgan domon. En januaro 1952 li aĉetis kastelon kaj bienon en Anjou (anĵu), bela histoririĉa regiono sude de Parizo.

Tiu kastelo, nomata Grésillon (grezijo), situas inter Baugé (boĵe), malnova urbeto, kaj Pontigné (pontinje), kampara komunumo, en la departemento Maine-et-Loire (menelŭar), nomata laŭ la du ĉefaj trapasantaj riveroj. Ĉirkaŭ la kastela bieno etendiĝas la fama Val de Loire, la valo de la rivero Luaro, regiono plej konata pro siaj kasteloj, sed loĝata jam de prahistoriaj tempoj, kiel atestas ĝiaj dolmenoj kaj imponaj megalitoj.

Iama reĝa ludejo kaj hejmo de poetoj, Valo de Luaro estas trezorejo de la franca kulturo. Meze de tiu trezoro brilas jam de 30 jaroj la Kulturdomo, Kastelo Grésillon. En januaro 1952 tio estis nur beleta kastelo, tute malplena. Mankis ĉio krom konstruaĵoj en alloga bieno. Kiam, je la 1a de julio 1952, la kastelo malfermis siajn pordojn al la esperantistaro, pluraj membroj de la Asocio jam provizis ĝin per akvo kaj elektro. Al tiuj pioniroj de la unuaj someraj aranĝoj mankis la komforto, kiun hodiaŭ ĝuas ĉiu loĝanto en la Kastelo – varma akvo en ĉiu loĝoĉambro, ĉetabla servado en la manĝejoj, centra hejtado, duŝejoj... Tamen, jam en tiu unua jaro sentiĝis la etoso de internacia familia kunvivado, ankoraŭ unika al Grésillon.

La ĉefa ekzistokialo de la Kulturdomo estas pedagogia, kaj ĝia ĉefa aranĝo dekomence estas la Somera Lernejo. Al tio aldoniĝas aliaj pedagogiaj aranĝoj kaj infanrenkontiĝoj je Pasko. Dum kelkaj jaroj okazis festoj ankaŭ dum la jarfina periodo.

La paska programo evoluas ĉirkaŭ la instruado de Esperanto al infanoj en lerneja medio. La somera programo ampleksas la plej diversajn kulturajn kaj distrajn aranĝojn, kaj kursojn por komencantoj, progresantoj kaj kursgvidontoj. Ekster la datoj de siaj aranĝoj la Asocio disponigas la riĉon de sia bieno – loĝebleco por 90 personoj, tendumejo, manĝebleco, ĉambroj, salonoj, aŭdvidaj aparatoj, 17-hektara parko kun arbaro, lago kaj naĝejo – al aliaj Esperanto-organizaĵoj, multaj el kiuj jam profitis de la proponataj avantaĝoj.

Tio, kio naskiĝis kiel projekto pri Esperanto-kulturo por francoj, tuj maturiĝis en kulturan centron en Francio por esperantistoj tutmondaj. En tia internacia medio la sole taŭga metodo instrui lingvon estas internacia metodo – la rekta metodo – kaj la kursoj en Grésillon, je ĉiu nivelo, estas gvidataj tiamaniere. La kursoj ne celas ekzamenojn, sed la Asocio starigas ilin por tiuj studintoj, kiuj volas ricevi montreblan atestilon pri akirita lingvonivelo. Internacia studintaro bezonas internacian ekzamenon. Ĉar ne ekzistas aliloke

LERNU esperanton
aŭ PERFEKTIĜU !

en GRESILLON
de la 11-a de Julio
ĝis la 31-a de Julio

KURSOJ

dum
KAMPARA
LIBERTEMPO

informoj,
aliĝoj:
esperantista kulturdomo
kastelo Grésillon
49150 BAUGE Francio

en la Movado taŭga ekzameno tute en Esperanto*, Grésillon, pro insistaj petoj de sia internacia gastaro, organizas proprajn internaciajn ekzamenojn je du niveloj – elementa kaj praktika uzo – kaj oni studas la eblecon starigi internacian ekzamenon ankaŭ je pli alta nivelo. La postuloj de la grezijonaj ekzamenoj estas sufiĉe severaj por garantii la valoron de la akireblaj diplomoj.

Krom la lingvokursoj kaj ekzamenoj estas provizata al la grezijonanoj instruado pri diversaj metioj, kiel: korbo-farado, librobindado, perlado, nodarto kaj fotado. La lingvo de la instruado – kiel de ĉio okazanta en la bieno – estas, kompreneble, Esperanto.

La koopera asocio, kiu administras Kastelon Grésillon, ne ricevas subvenciojn. Donacojn ĝi foje ricevas, kiel en 1975, kiam Institucio Hodler asignis 500 nederlandajn guldenojn por aĉeto de mebloj. Por siaj vivtenrimedoj, tamen, la Kulturdomo dependas ĉefe de la pagoj faritaj de la gastoj por restado. Tiuj pagoj inkluzivas partoprenon en la kastelaj aranĝoj, sed studmaterialon kaj partoprenon en ekzamenoj oni devas krompagi. Por suplementi tiujn pagojn la Asocio vendas librojn, trinkaĵojn, frandaĵojn kaj memoraĵojn, kaj administras korespondkursojn.

Por prizorgi kaj plibonigi la bienon kaj ĝiajn konstruaĵojn, por taŭge ekipi la metiejojn kaj salonojn, plivastigi la kulturajn agadojn, la Asocio enspezas bezonatan monon per emisio de akcioj. Ĉiu posedanto de akcioj rajtas je unu voĉo en la direktado de la asociaj aferoj.

---

* Lastatempe tamen la Estraro de UEA tre intense okupiĝas pri la starigo de elementa kaj mezgrada ekzamenoj, kiuj estos internacie aplikeblaj. Vidu pri tio raporton pri la estrarkunsido **aliloke en ĉi tiu revunumero.**

Plurnacia infana grupo kvazaŭ lude lernas Esperanton dum feria restado en la Kastelo Grésillon. (Foto: Monique Dairon)

27a de junio - 10a de julio
1982

PRELEGOJ
DEBATOJ
DIVERSTEMAJ

STUDADO DE LA LINGVO
MALKOVRO DE
LA REGIONO

por informoj kaj aliĝoj, skribu al
FRANCA ESPERANTISTA
KULTURDOMO
Kastelo Gresillon
49150 BAUGE

Pli ol kvar milionoj da francaj frankoj, kiuj ĉiujare trafluas la kason de la Asocio, provizas al la kastelaj gastoj (kiuj nombras ĝis 400 en ĉiu jaro) materian fonon por kulturaj kaj distraj aranĝoj, kiujn karakterizas la riĉa diverseco de internacia partoprenantaro.

Aldone al siaj surbienaj aktivaĵoj la Asocio eldonas librojn kaj la dumonatan revuon *Kulturaj kajeroj.* Tiu periodaĵo spegulas la vivon de la Kulturdomo, publikigas prelegojn faritajn en la kadro de la kastelaj aranĝoj kaj artikolojn de eminentaj esperantistoj, i.a. pri la kulturo kaj historio de la lando kie efektiviĝis la ideo krei realan Esperantujon.

La Kulturdomo Grésillon estas volontule estrata de esperantistoj por esperantistoj el kiu ajn lando, de kiu ajn kredo religia aŭ politika. Dum la 30 jaroj de ĝia ekzisto prelegis en ĝi kelkaj el la plej eminentaj esperantistoj, inter kiuj: William Auld, Ivo Lapenna, Vilho Setälä kaj Gaston Waringhien. La Kastelo estas somera lernejo, infanrenkontiĝejo, kongrescentro kaj feriejo, sed por ĉiuj partoprenantoj ĝi estas multe pli: unika en la Esperanto-movado, ĝi estas la hejmo, kie, jaron post jaro, anoj de diversaj popoloj jam spertas kunvivadon kiel "unu granda rondo familia". Neniu kiun tuŝas la ĉarmo de la grezijona vivo iam volas liberiĝi de ĝi. Ĉiu jam forirante planas reveni tien.

Audrey C.E. Childs-Mee

Pri kio (mal)entuziasmas Juan Régulo-Pérez

Kvankam ĉi tiu teksto venis al la redakcio tuj post la apero de la libro (meze de 1981) kiun ĝi traktas, ni longe ŝanceliĝis pri la demando, ĉu aperigi ĝin aŭ ne. Tio ne okazis pro la aŭtoro de la teksto, ĉar ĉiam estas regalo ricevi plian pasian eseon de la plej elstara movada eldonisto post la Dua Mondmilito. Kiel vi konstatos en la teksto mem, temas pri lingvaj novismoj, kiujn proponas la originala romano de Piĉ kaj kiujn prof. Régulo entuziasme ekuzas. Vi ja scias, ke ĉi tiu revuo – vole-nevole – ludas eksterordinare gravan rolon rilate la praktikan normigon de la lingvo, rilate la familiariĝon kaj sekve ankaŭ legaliĝon de ĉiuj neologismoj, novismoj kaj aliaj kapricoj de unuopaj uzantoj de la Internacia Lingvo. Tiu rolo trudita al ĉi tiu revuo estas eble la plej granda el la redakciaj ŝarĝoj, ĉar plejofte ne eblas solvi tiajn demandojn per simpla jes aŭ ne, kaj neniam restas tempo por vastaj sondoj kaj konsultiĝoj. Aliflanke, la baza rolo de ĉi tiu revuo estas almenaŭ provo informi la legantojn pri ĉio grava okazanta, ĉu en la Movado, ĉu en la lingvo mem. Konsideru do la aperigon de la sekva teksto simple kiel provon informi vin pri parto de la lingvaj novaĵoj, kiujn enhavas la romano de Piĉ. Sciu tamen, ke vi ne trovos tiujn "par", "nam", "koram" ktp. (kiujn ni glosas fine de la teksto) tuj en nia venonta numero. Vi eble trovos ilin neniam plu en ĉi tiu revuo, ĉar ili eventuale spertos tiun saman sorton, kiu trafis la plimulton de la antaŭaj novismoj, kiuj nun putras forgesitaj en la ampleksa neologisma tombejo de Esperanto. Fine, ni vidas apartan valoron de la teksto de prof. Régulo en ĝia lasta triono, kiu estas bela kaj tre necesa lekcio pri kelkaj persiste neglektataj aspektoj de la eldona arto.

La litomiŝla tombejo, de Karolo Piĉ (1920-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981. 276p. 20cm. Prezo: 44,10 guldenoj.

ILUZIADO KAJ LEGENDO pri l' golemo – homforma estaĵo knedita el malnobla argilo, kiu en la 16a-jarcenta Ĉeĥujo *par*sorĉis al si ion similan al animo – libere cirkuladas tra Eŭropo ekde almenaŭ la 12a jc. La nuna literaturo pri robotoj (vorto kaj koncepto kreitaj de la ĉeĥo Karel Čapek) fontas el la dialektika principo inter la **vera homo** kaj tiu, kiun al si mem simila li penas krei. Ne vane Karolo Piĉ estas ĉeĥo, kiu magie transsorĉis animon en sian romaneskan kronikon, tuŝitan de superrealismo – ĝi ja establas historiajn koneksaĵojn! – en ia esperant*al*a golemujo.

Ĉar, nu, temas pri romano, sed pri kronika romano, verkita kun seriozhumura tenero. *Nam*, en tiu ĉi romano, la fabulado estas la absoluta protagonisto. Forma, movada, lingva fabulado*. Temas do pri rakonto vortume bunta, riĉa, fojfoje eĉ tro riĉa, ĉiam enhave kaj lingve obseda. La fabulo – lingva kaj rakonta fabulo – voras per siaj lingvointrigo kaj rakontinterplekto tiujn, kiuj tra ĝi aventuras. Tiu rakonta **Vi** de la tuta romano legologas serĉe de la fabula vero.

La unua fabula vero estas tiu pri la lingvo. La esperantuja plimulto opinias, ke Esperanto estas lernolibra (gramatika, vortara, frazeologia) roboto, kiu iel aŭ tiel povas prezenti literaturan surogaton. Kion ja montras tiu ĉi libro, tio estas, ke Karolo Piĉ magie priskribas la manieron, kiel el lernolibr*al*oj povas deiĝi artisma beletro per eksperimente ortodoksa lingvaĵo. Tiurilate li pruvas, ke Esperanto estas samtempe kaj lingvo kaj teĥnika invento. Kaj ke ĝi vivos dum ĝi restos **funkcianta artefaritaĵo**. Per Piĉaj vortoj: en Esperanto "naturalismo estas kontraŭsenco kaj sensenco. *Nam* la mondo ne bezonas unu plian ĥaosan **lingvon nacian.**"

Kia lingvistike noble dislumanta gemo estas la Piĉa postĉapitro "La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj"! En ĝi Piĉ montras, ke Esperanto estas jen eĉ artefarita, jen eĉ evolua lingvo, kaj, krome, kiel ĝi jam kombine superas kaj laŭe povos superi la dialektikan fundamentan veraĵon, kiun ĝi prezentas, nome: artefaritan kaj vivantan interkompreniĝo-sistemon. Piĉ, per interproksimigo de esprimmanieroj el multaj lingvoj, proponas ekonomian disvolvon de latentaĵoj de Esperanto, surbaze de sintezo de internaciaj lingvokomponantoj. Neniam antaŭe mi troviĝis antaŭ tiel konscia almeto de la lingve historia celo kaj civiliza misio de Esperanto.

Enhave, Piĉ konstruas laŭ sia memoro. Liaj paĝoj estas rememorado. Lia memoro agas kiel filtrilo tra lia nuna mondkompreno. La libro estas komponita ekde meĥanismoj retrospektivaj de la nuna situacio. Sed ĝi ne

TURISTA VOJAĜO EN SUDA NORVEGUJO somere 1982 (28/6 – 3/7)

Turisma Servo de Norvega Esperantista Ligo planas turistan vojaĝon por esperantistoj tra la plej belaj partoj de suda Norvegujo, inter la 28a de junio kaj la 3a de julio 1982. Ekiro el Oslo, vizito i.a. al dometo de fama verkisto Knut Hamsun kaj fostopreĝejo de Lom, fjordo de Geiranger, al glaciejo, famaj akvofaloj ktp.

La prezo por la tuta vojaĝo estas 2600 norv. kronoj. Necesas minimume 20 aliĝintoj. Por pliaj detaloj skribu al: Turisma Servo de NEL, Olof Schous vei 18, Oslo 5, Norv.

estas agromezurista registrado; ĝi estas beletra kreaĵo, en kiu intervenas la imago transformanta la eton en egon, la egon en eton. Sed samtempe la libro estas farita kun lojalo kaj digno. Tre humane. Certe ĝi, tiel, entuziasmigos, mirigos multajn; sed, samtempe, forte iritos aliajn.

La rakonto modliĝas ĉirkaŭ koncentraj cirkloj neelĉerpeblaj, ĉiam revenantaj. Piĉ, ame kaj endogamie, edziĝis al Litomišlo, al Esperanto kaj al Femino. Al tiu triopo li, dediĉe-karese, fordonas la plej sunbanitan lokon de sia koro. Kaj tion li elverŝas per intern-ekzila, soleca, orgojla sagao. Ĉio tra la rigora leĝo de la ambigueco. La teksto de Piĉ estas riĉega kaj ĝi konfuzas; ankaŭ ĝiaj flankaj, fratparencaj, ekstertemaj ekskursoj agas tiudirekten: la vualoj ŝajne faladas antaŭ ni, sed ili neniam *par*falas. La intermetitaj rakontniveloj sig-



La libro kaj ĝia aŭtoro: Ĉu la akademiano Piĉ senrespondece manipulas kaj perfortas la Internacian Lingvon?

nas vojon; kaj ĉiu nivelo havas sian propran lingvaĵon, ĉiam tre zorge prilaboritan, same leksikone kaj sintakse, kiel – ĉefe, ĉefege – ritme kaj stilistike. Ĉio kunfluas. La rolantoj sin diluas en la fizikan kaj magian spacon, kiu ilin volvas. Tra la tuta fabulado la spertosaĝa scio de la aŭtoro transigas la rolantojn en figurojn de beletra friso, kie ili fariĝas belliterature eternaj. Piĉ forĝis la unua prozan epopeon de nia lingvo internacia.

Tra la tuta kronikeska roman*al*o, Piĉ, trilkanta kanario de Esperanto, aperas *koram* ni kiel lingve tumultema, maliceta, sed ĉiam, tamen, kun dolĉa beko; li sin prezentas kiel home kontraŭdira, fojfoje furioza, eĉ perverseta, anarĥia, sed samtempe kun blanke mola, tenera, anĝela kropo. Humane.

(Parenteze, mi volas esprimi al Piĉ tute apartan dankon pro lia justa aprezo – ĉap. 49 – de nia komuna amiko d-ro Tomáš Pumpr, unu el la masive oraj homoj, kiujn mi renkontis en Esperantujo.)

La fizika korpo de la libro prezentas artisme elektitajn surkovrilan kaj kovrilan desegnaĵojn. La teksto estas akribie pura. Sed la tipografia arĥitekturo estas dense fuŝa. Ekz-e, *nefas* presi nur unu linion sur unu paĝo (p. 11); oni ne devas presi neplenan linion paĝokomence (p. 9, 51, 63 ktp); estas turpe kaj tipografie malkonsilinde presi linion de nur unu mallongigo, kiel sur p. 249 **ktp.**: en tiuj kazoj oni presas sen mallongigo: **kaj tiel plu**. Ktp. Ne ĉiuj paĝokadroj estas egalaj: ekz-e, sur p. 187 estas unu linio pli ol sur p. 186: se oni estus transportinta la lastan linion de p. 187 al 188, tiam ne aperus neplena linio komence de 188 kaj la tuto restus ekvilibra. Fojfoje la supra blankaĵo de du kontraŭaj paĝoj ne estas egala, ekz-e 192-193. Alifoje la preso de malpara kaj represo de para paĝoj ne koincidas, kio malegaligas la marĝenojn. La apudspinaj marĝenoj devas esti malpli larĝaj (ĉar la vido sumigas ambaŭ) ol la eksteraj. Ktp. La tuto donas la impreson kvazaŭ temus pri fasko de nete korektitaj presprovaĵoj ekprove paĝigitaj kaj tiel kunkudritaj. Eĉ pli ol la libro *1887 kaj la sekvo. . .* de Waringhien, kiu estas ja vere fuŝa el vidpunkto tipografiarĥitektura. Espereble la festlibro pri Waringhien* estos fizike pli bone realigita. Libron naskitan por eterneco oni devas ekipi tipografie noble kaj ortodokse bele.

La prezo estas tro alta por la publiko de Esperantujo. Tiu libro, eĉ se ĝi iom post iom fine elvendiĝos, probable ne tuj ekfuroros inter la ordinara esperantista amaso; sed eĉ por elituloj ĝi estas nete pli altpreza ol simila nacilingva libro. Tiel ne devas esti. En Hispanujo, nuntempe, unu tia libra fizikaĵo apenaŭ kostus trionon.

Sed eĉ kun tiaj eksteraj makuletoj, kia plezuro havi en la manoj tiun libron! Por mi ĝi randas eĉ erotikan ĝuon! Malgraŭ ĝiaj fizikaj feblaĵoj (aldone, mi forte dubas pri la dezirindo presi la tekston per **tiaj** kursivoj), mi estas ĝisekzalte entuziasmigita de tiu Piĉ*al*o. Mi profunde dankas kaj la aŭtoron kaj la eldoniston pro tiel eksterordinara donaco!

Juan Régulo Pérez

---

* Temas pri la festlibro, kiun pasintjare planis la Akademio okaze de la 80-jariĝo de prof. Gaston Waringhien. Montriĝis, ke nia publikigo de fragmento el tiu libro, okazinta kun la permeso de la eldonejo (TK/Stafeto) kaj la aŭtoro de la koncerna teksto (M. Duc Goninaz), sed ne kun tiu de la redaktoro de la libro (R. Haupenthal), kaŭzis eksiĝon de la redaktoro kaj neaperon de la libro. Ni vere bedaŭras tian evoluon de la aferoj kaj ĝojas aŭdi, ke la redaktoro lastatempe reprenis la laboron kaj la apero de la libro estas atendata ĉi-jare.

Glosoj:

-al: Neoficiala teknika sufikso (PIV) al kiu Piĉ donas plian signifon, ne teknikan sed ĝeneralan signifon de "adjektivsubstantiviga" sufikso, kiu "estas kvazaŭ ia nepersona paralelo de *-ul*"

fabulo: Enhavo de beletra verko, ĝiaj intrigo, okazado, temo

koram: Antaŭ, en la ĉeesto de (koram juĝisto, koram publiko)

nam: Konjunkcio malpli forta ol *ĉar* aŭ *pro tio ke, tial ke*; ĝi esprimas ion inter *ĉar* kaj *ja*. . .

nefi: Ne esti permesite, esti malpermesite

par-: Prefikso esprimanta kompletan plenumon, plenumiĝon.

NOTO: La lingvouzo en la romano *La litomišla tombejo* ne estas iu momenta kaprico de la aŭtoro. Ankaŭ la dua libro de Piĉ – la poemaro *Angoro* (aperinta en marto 1982 ĉe la sama eldonisto – enhavas plurpaĝan notaron, kiu klarigas novismojn de Karolo Piĉ.

INICIATOJ:

Rubriko pri vilaĝa vivo

EN DECEMBRO pasintjare, ni skribis pri la Esperanta rubriko en la irana revuo *Ĝavanan* kaj provis elstarigi la grandegan informan valoron de tiaj entreprenoj. Kelkfoje dum la lastaj jaroj ni menciis tute alispecan rubrikon, kiu aperas en la monata gazeto *ZET* de la urbtrafika entrepreno en Zagrebo (Jugoslavio). Tie ne temas pri informoj, kiuj rilatas al la Internacia Lingvo sed pri rubriko, kiu utiligas Esperanton kiel dudirektan informan ponton. Unuflanke, diverslandaj kunlaborantoj de la gazeto sendas en Esperanto siajn novaĵojn pri la urba trafiko, kaj ili aperas en la kroatserba lingvo, kun mencio ke ili estiĝis per traduko el Esperanto. Aliflanke, *ZET* en ĉiu sia numero havas kolumnon en Esperanto, kun resumo de la plej interesaj tekstoj de la koncerna numero. Tiu unika utiligo de la Internacia Lingvo, iniciatita kaj efektivigata de s-ro Zvonko Rehorić, daŭras jam du jardekojn kaj la redakcio de la gazeto ŝajnas entuziasmi pri ĝi.

Nun venas alia, samstila iniciato. Ankaŭ ĝi originas el Zagrebo. S-ro Slavko Šimunić, profesia ĵurnalisto, kunlaboranto de la revuo *Selo* (Vilaĝo), kiu havas 25 000 abonantojn kaj aperas en duoble pli granda eldonkvanto, planas pere de Esperanto lanĉi dupaĝan rubrikon "Eksterlandaj spertoj". Laŭ cirkulero ricevita fine de marto, s-ro Šimunić planas en la nova rubriko "publikigi diversajn artikolojn, raportojn, komentojn, informojn, leterajn intervjuojn ktp. pri eksterlandaj spertoj en agrikulturo, en nutraĵproduktado ĝenerale, en bestobredado, vivmaniero, vivproblemaro de vilaĝoj diverslandaj". Kompreneble, bonvenas ankaŭ fotoj kaj alispecaj ilustraĵoj. Kiel en la kazo de *ZET,* oni planas, por poste, ankaŭ rubrikon en Esperanto aŭ aperigon de Esperanto-kurso. Adreso por pliaj informoj: S. Šimunić, Cerska 18, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Kongresa Komuniko

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Antverpeno (Belgio) 1982 07 24-31

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Dua bulteno. Tiuj, kiuj jam aliĝis al la UK devas nun posedi la Duan Bultenon. Kun tiu 50-paĝa eldonaĵo estas dissenditaj pluraj mendiloj pri loĝado, ekskursoj k.s. Aparte interesa por filatelistoj estas la mendilo por filatelaĵoj, kiuj inkluzivas ne nur la specialan poŝtmarkon de la Kongreso sed ankaŭ diversajn unuatagajn eldonaĵojn kaj stampojn okaze de la anticipa vendo la 5an kaj 6an de junio sub la titolo "75 jaroj de Esperanto en Antverpeno".

Teatro. Dum sia marta kunsido la Estraro de UEA aprobis la principon, ke dum la UK ĉiu kongresano ricevos – kiel kutime – unu senkostan enirbileton por elektota teatraĵo, sed ke aliaj teatraĵoj estos pagendaj. Ĉar la Kongreso nun disponas pri belega, sed nur mezgranda teatro (800 sidlokoj), ne estos eble permesi al ĉiuj ĉeesti samtempe. La intenco do estas starigi plenan teatran programon, kiun kongresanoj spektu laŭdezire kaj laŭ la havebleco de sidlokoj, kiuj estos vendataj, ĉu kontraŭ mono, ĉu kontraŭ la senkosta bileto. Oni antaŭvidas tiel povi prezenti ĉ. 7 diversajn teatraĵojn, sen paroli pri la senkostaj tradiciaj aranĝaĵoj en la kongresejo mem, kiel la Muzika Vespero, Nacia Vespero ktp.

IKU. El impona listo de proponoj, la Komisiono pri Internacia Kongresa Universitato unuanime rekomendis, kaj la Estraro de UEA unuanime akceptis, 11 prelegojn pri plej diversaj temoj. Estas aparte plaĉe, ke 3 el la prelegontoj estas virinoj kaj, ke la 11 prelegontoj venas el 10 malsamaj landoj.

Esperantologia konferenco. Ankaŭ ĉi-jare estos Esperantologia konferenco dum la Kongreso. Cetere, oni esperas aranĝi renkontiĝon inter belgaj lingvistoj kaj esperantologoj, por malfermi la Movadon iomete al tiu parto de la ĝenerala neesperantista publiko.

Karavanoj. Ni jam skribis pri karavanoj en tiu ĉi rubriko kaj nun ripetas la faritan sciigon, ke ekde ĉi tiu jaro la nova Kongresa Regularo ofertas favorajn kondiĉojn al grupaj aliĝoj de minimume 25 kongresanoj. Tamen, por profiti de tio, karavanestroj devas peti ĉe la konstanta adreso ekzempleron de la Regularo kaj tiam ankaŭ akcepton de la proponata karavano.

Statistiko. Ĝis nun aliĝis ĉirkaŭ 1300 kongresanoj. Se oni komparas tiujn ciferojn kun antaŭaj jaroj, oni povas – kun iom da fido – atendi verŝajne 2000 kongresanojn en Antverpeno.

La legenda heroo Brabo ĵetas manon de giganto por doni nomon al la urbo de la 67a UK. Nia glumarko aperis pli malfrue ol kutime sed kompense kostas pli malmulte: po 6,00 (por Nederlando 6,86) guldenoj por cent brilarĝentaj memgluaj markoj sur vakspapero, inkluzive sendokostojn. Mendu!

Traduko helpos kompreni la originalon

La sonetoj/The Sonnets (1609), de William Shakespeare (1564-1616). El la angla trad. William Auld (1924-). Pisa: Edistudio, 1981. 326p. 21cm. Bindita. Serio Oriento-Okcidento n-ro 16. ISBN 88 7036 013 X. Dulingva (angla-Esperanta) eldono. Prezo: 40,20 guldenoj.

La sonetoj temas, laŭ la modo de la epoko, pri amo (amoro) kaj la tempo; ĉi-lasta en la senco de vivotempo aŭ aĝiĝo, kaŭzanta timon antaŭ la morto, spite al (aŭ ĝuste kaŭze de) la tiutempe tre forta – aŭ ŝajne tre forta – religiemo. Tiel ekzemple la fina distiko de Soneto 18:

Dum homoj spiros kaj okuloj vidos
vivos ĉi vers', kaj morton vi evitos

bone reeĥas la ŝlosilon de Soneto 17 de Camões:

ĉar dum enmonde vivos plu memoro
ĉi versoj miaj estos via gloro.

La unikeco pri la amsonetoj estas ke la plejmulto direktiĝas al juna viro. Pro tio oni supozis/as Ŝekspiron



"La sonetoj" estas almenaŭ la 15a verko de Ŝekspiro kiu aperas en Esperanta traduko.

sam- aŭ duseksemulo. Ne tre prave tamen, pro diversaj motivoj. Kiel la tradukinto komentas en la antaŭparolo, ŝajnas multe pli probable, ke la poeto estis influita de la **platona idealismo**, kiu estis tre moda en tiu epoko. Krome, ekzistas forta kaŭzo verki dediĉe al junulo certe riĉa kaj patronanta la aŭtoron. Kontraŭ seksamo inter ili parolas ankaŭ la fakto, ke en 17 sonetoj Ŝekspiro instigas la junulon generi idon. Nu, seksamo implicas ĵaluzon, postulas ekskluzivecon. Cetere, kiel same rimarkas la tradukinto en Soneto 20, Ŝekspiro eksplicite refutas fizikan amon pro la natura alpendaĵo de la junulo. Tamen ĝuste tio povus veki la impreson pri latenta pederastiemo ĉe li, ĉar li konsideras ĝin "atenco, al lia cel' nuliga barikado". En postaj sonetoj li klare parolas pri seksrilatoj de ambaŭ viroj kun aliseksa estaĵo, kiu cetere ilin kokras, estante se ne ĉiesulino almenaŭ **pluriesulino.**

Ŝekspiro pri tiuj solaj du temoj – amo kaj tempo – per sia kutima detala analizo nudigas multajn kaŝitajn angulojn de la homa animo, evidente sen la violento de la dramoj, tamen, kiel decas al lirikaĵo, per subtila sed tre profunda sondado.

Se la tasko de la tradukinto el teknika vidpunkto unuflanke pli facilis pro la angla rimaranĝo de soneto (4+3 paroj, anstataŭ la 2 damne malfacilaj kvaroj + ofte 2 trioj de la latinidaj sonetoj), aliflanke venkendis la Esperanta plus-silabeco kompare kun la angla. Tion li brile sukcesis per reduktado al kunmetaĵoj, tiel ne mutilante la originalan tekston. Estas la unua fojo, ke mi vidas **longe** (adverbo) en spaca senco, sed, ĉar kun la finaĵo **n**, ne eblas konfuzo kun tempa senco. Krom la citita gloso **hati**, mankas **notora** (66.7) kaj **ĉendi** (153.9).

Nur tre malmultaj preseraroj troviĝas kaj tiuj ĉefe en la notoj. Ĝenas tamen la ripeto de strofo 1 anstataŭ 2 en Soneto 15.*

La dulingva prezento helpos speciale parolantojn/studantojn de la angla pli bone kompreni la originalojn. Ĉi tiu libro estu ne nur bretarornamo, sed nepre de tempaltempa legendaĵo. Persistemaj romantikuloj parkeru soneton 130; tio helpos al ili eviti klišajn tropojn.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

* La mankanta traduko de la dua strofo en Soneto 15 tekstas jene:

Kiam pri l'kresko homa mi rimarkas,
Ke bridas-pelas ĝin ĉielo sama:
Post sukoplena jun' ĝi suben arkas
Kaj nur memoras pri la stat' iama,

Ne necesis tiel rapidi

Brazilaj geografiaj nomoj. de Délio Pereira de Souza. Brasília: Laborgrupo "Antaŭen", 1981. 72p. 20cm. Brazilaj Kajeroj 1. Prezo: 3,90 gld.

Laŭdindan taskon plenumis la aŭtoro esperantigante preskaŭ 900 brazilajn geografiajn nomojn. Laŭ la aŭtoro, kiu konfesas, ke ankoraŭ ekzistas multaj eraroj, temas nur pri proponoj.

Fakte, oni devas konstati kun bedaŭro, ke la esperantigo ne okazis konsekvence, kiel ekzemple ĉe la nomoj kun "san", "são", "santo", "santa" ktp.

Klopodo, kiel la prezentita, bezonas multan pripenson kaj diskuton kun fakuloj. Unua eldono do devus esti

multobligita kaj nur poste presita, ĉar en ĉi tiu lasta formo ĝi nun ŝajnas fakte oficialigo, speciale por novaj esperantistoj. Ankaŭ ne necesas esperantigi jam nun malmulte uzatajn kaj uzotajn nomojn. Oni do, uzante ĉi tiun liston, apliku nur la plej gravajn nomojn, kaj ankaŭ tiujn kun sufiĉa singardemo.

J.M. Mabesoone (Brazilo)

Bela traduko en eleganta vesto

Ho ve, miaj ŝuoj!, Georg Fröschel (1891 -). El la germana trad. Britta Lindeberg (1917 -). Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1981. 58p. Ilus. 19cm. ISBN 91 85288 04 7. Prezo: 12,90 gld.

Ĉu vi serĉas facilan legaĵon por komencantoj? Jen, bonvolu.

Per neintenca intermikso en hotelo malaperas altvaloraj diamantoj. Inventema deksesjarulo ekdetektivas. Hastado, mistrafoj, glora fino.

La germana originalo aperis en 1932. Hodiaŭ la ekscita rakonto de Fröschel ŝajnas iomete lama kaj malfreŝa, kiel ofte okazas kun humuraĵoj en lernolibroj.

Lingve la libreto estas facila. Certe pro tio oni en Svedujo, kie nun aperis la Esperanta eldono, plurfoje eldonis la originalon kun glosoj por lernantoj. La traduko estas flua kaj glata; ĝi tamen iom kroĉiĝas al la germanaj tensoj, aparte al pluskvamperfekto. Ankaŭ la vortelekto estas jen kaj jen tro vortara kaj ne ĉiam tre trafa.

La tekston bele ilustras desegnaĵoj de Hans Kossatz, certe pli konata ol la aŭtoro de la rakonto. Grafike la libro estas brila, kiel svedaĵoj kutimas esti.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Formo atencas enhavon

Makedonaj popolaj rakontoj. Tradukis J. Velebit kaj S. Šimunić. Redaktis J. Velebit. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1977. 141p. 20cm. Prezo: 7,20 gld.

La libro, antaŭparolita de d-ro Tome Sazdov, estas dividita en jenajn ĉapitrojn: Rakontoj kaj anekdotoj, Fabeloj, Rakontoj pri bestoj kaj fabloj, Legendoj kaj tradicioj.

La plejmulto de la rakontoj kaj fabeloj pritraktas okazintaĵojn, kiujn al la homoj kaŭzis, ĉu diabloj, ĉu virinoj. Enestas ankaŭ rakonta triopo pri la makedona popola ŝerculo Peĉjo Sagaculo, spirite parenca al la bulgara Hitar Petar, hungara Ludás Mátyi, rumana Păcală, turka Nasrredin kaj ujgura Afandi. Rimarkindas la mallonga anekdoto "La inventema junulino" kaj kelke da fabeloj rememorigantaj pri "1001 noktoj", inter kiuj amare gustas, pro sia fino, "La justa vulpo", bonega specimeno de rakont-en-rakonta fabeleto.

La tradukintoj ĝenerale bone plenumis sian taskon, tamen, amaso da – por tiel diri – "balkanismoj" forte ĝenas ne-balkanan leganton (ekzemple: *Haltu, fileto...*, anstataŭ **Atendu...**, p.30; *ek, ke ni vidu vin...*, anst. **ni vidu vian kapablon...**, p.32). Al tio oni devas aldoni iujn mistradukojn (oni *detranĉas* la voston, kornojn kaj orelojn de bovino, post kio ŝi aspektas... *ĉirkaŭhakita,* p.68-69; por la senco **aĝa** oni uzas jen *alta,* p.34, jen *granda,* p.87), tre oftan mankon de la artikolo kaj abundon de preseraroj.

Kvankam la libro estas laŭenhave rekomendinda, ĝi embarasas pro siaj stilaj kaj eldonaj neperfektaĵoj.

Constantin Dominte (Rumanio)

Ampleksa sortimento de hajkoj

Hajka antologio. Red. M. Miyamoto kaj M. Ueyama. El la japana trad. Hajkista Klubo. Kioto: L'Omnibuso, 1981. 220p. 17cm. Prezo: 18,60 gld.

Oni dirus, ke tiu ĉi antologio venas al kompetenta publiko. Malmultaj poeziaj formoj fakte ĝuis popularecon egalan al tiu de hajko en la Esperanta literaturo, kion pruvas la fakto, ke eĉ pluraj okcidentanoj provis originale verki en Esperanto laŭ tiu triversa skemo (ofte ne konante la verajn regulojn de hajko). Krome, multaj esperantistoj certe memoras la belajn poemarojn de japanaj aŭtoroj, kaj, ĉefe, la eminentan klasikaĵon *Invit' al japanesko* de M. Miyamoto. – Malgraŭ tio, foje oni havas la impreson, ke nur la formo, kaj ne la spirito de la japana hajko atingis la okcidentajn orelojn. Jen do la vera rolo de ĉi tiu antologio: enkonduki en la universon de hajko, oferti fragmenton de la orienta pensmaniero.

Tri versoj el kvin, sep kaj kvin silaboj respektive: per tiu molekula formo de liriko japanoj konstruas sian poezion. En klasika epoko, la hajko ĉiam entenas la "kigo", nome sezon-vorton, kiu rekte aŭ nerekte (ekz. per mencio de festo, floro, arbo) indikas la fonon de la eta pentraĵo; abundas ankaŭ "karejoj" (cezur-vortoj), kiuj anstataŭas la interpunkcion de la okcidentaj lingvoj (eble oni povus kompari ilin al la vortetoj "men" kaj "de" de la helena lingvo). Per tiuj simplaj iloj, la japana poeto kreas bildojn eksterordinare elvokivajn:

Sur branĉon io...
ĉu flor' falinta retro?
Ne, papilio.
(Arakida Moritake, 1493-1547)

Sur voj' vojaĝa
mi morbas, kuras sonĝo
tra kamp' sovaĝa.
(Matuo Basyo, 1644-1694)

Novjar' matene,
kvartalo samuraja
kvietas plene.
(Kobayasi Issa, 1763-1827)

Malgrandaj, rafinitaj juveloj, perfekte fermitaj en sia mallongeco, je la antipodo de ĉiu eposo: kiel en la eŭropaj sonetoj aŭ madrigaloj, ilia forto konsistas ĝuste el koncizo.

Vi trovos en ĉi tiu ampleksa sortimento hajkojn el la klasika epoko (aparte rimarkindas la verkoj de Matuo Basyo, mondnivela poeto), kaj el la moderna. Foje, en tiel vasta kolekto, oni perceptas la superfluon kaj artefaritecon de rimado inter la unua kaj tria versoj; rimo ja restas iom fremda al la hajka spirito, kaj oni facile rezignus ĝin. Interesa postparolo klarigas la historion kaj la formojn de hajko, kaj estas tre esperinde, ke la du spertaj kompilintoj baldaŭ aperigos multe pli detalan eseon pri la sama temo.

Mauro Nervi (Italio)

Movadaj satiraĵoj de Beaucaire

Fabeloj de la verda pigo, de Louis Beaucaire (1925-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1981. 110p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 20 7. Prezo: 19,80 gld.

La verkoj de Louis Beaucaire aperas sur la libromerkato ne ofte, sed regule. Post la furora kehleta *Kruko kaj Baniko* (1970 kaj 1974), nun jam klasikiĝinta kolekto de maldecaj anekdotoj, venis dua bervalaĵo, la stafeta *El la vivo de bervala sentaŭgulo* (1974), unu el la raraj provoj prezenti la esperantistan mondon, el sia ridpunkto, kiel mondon de plenkreskaj humuremaj kaj amoremaj homoj.

Post tiu sciencfikciaĵo, tiuj fabeloj por plenkreskuloj, nun venas la tria verko, komunforta kehleta/stafeta, *Fabeloj de la verda pigo.* Al la publiko prezentas sin unuafoje certe famiĝonta inteligenta – sed ne ostiginta – klera verda pigo, denaska esperantisto, rakontanta al infanoj, ariĝintaj sub ĝia poplo, fabelojn el la esperantista mondo. Ĉi-foje pruduloj ne timu, vi povas ĉi tiun libron kviete meti en la manojn ankaŭ de viaj infanoj, kvankam saman plezuron spertos ankaŭ pli verŝajnaj plenkreskaj legantoj.

En ĉi tiu koktelo de bonkore malicaj ŝercoj, la aŭtoro draŝas dekduon da motivoj el la movada vivo kaj ofte, per sia sprita kaj trafa fantaziemo, igas la leganton sekrete ŝmaceti pro plezuro. Al la legantaro malsekretiĝas i.a. tiel gravaj faktoj kiel ekz. la rolo de la feinoj en la movada pasinteco, la historio de la milito de la ĉapeloj en la Esperanta alfabeto kaj la fia agado de la deksepa regulo de la Fundamento. Poezietosaj rakontoj "La eta poeto kaj la lokomotivo" kaj "La revisto", aliflanke, igas min iom bedaŭri, ke la aŭtoro ĝis nun ne pruvis siajn kreajn fortojn en ekstermovadaj temoj, prezenteblaj en traduko al la neesperantista mondo.

La belaspektan libron ornamas titolpaĝa desegnaĵo de la fama Jean Effel kaj riĉa bonhumura ilustraĵaro de Stano Markovič kaj – se oni povas esprimi sin tiel – ankaŭ senriproĉa, kelkfoje freŝe inventema lingvaĵo.

Fine: donacu al vi mem plezuran vesperon, legu, ĝuu, kaj vi certe ne miros, ke tiu ĉi verko apartenas al la plej multe vendataj libroj en la pasintjara bilanco de la Libroservo de UEA.

Ivo Železný (Ĉeĥoslovakio)

Ĉio okazis en Prago

Rakontoj el la unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo, de Karel Čapek (1890-1938). El la ĉeĥa trad. J. Vondroušek. Prago: ĈEA, 1981. 285p. Ilus. 20cm. Prezo: 11,40 gld.

Karel Čapek estas unu el la plej grandaj ĉeĥaj verkistoj, kaj, se mia rapida bibliografia trarigardo ne eraris, tiu ĉi volumo prezentas la plej ampleksan ĉerpaĵon el lia verkaro al la esperantista publiko.* Ja valorega prezento, ĉefe por tiuj legemuloj, kiuj vivas en landoj, kie oni tre malofte aperigas verkojn el malgrandaj literaturoj: ekz. en Italio mi sukcesis atingi nur unu verkon de Čapek (*R.U.R.*), malgraŭ la evidente internacia staturo de la aŭtoro. Por mi, kaj por samkondiĉaj legantoj en aliaj landoj, tiu ĉi eldonaĵo konsistigas do gravan riĉigon de la literatura kulturo.

La prezentataj noveloj aperis en 1929, nome kvin kaj ses jarojn post la mortoj de Kafka kaj Hašek respektive. Kaj, malgraŭ la relative granda spirita distanco, tiuj du ombroj certe vagas en la mondo de Čapek; Kafka kontribuis al ĝi per siaj mallumaj medioj kaj maltrankviligaj, senkaŭzaj okazaĵoj (konsilisto sen malamikoj suferas murdatencon; policisto senmetode malkovras kasrompintojn, ktp.), kaj Hašek, eĉ pli evidente, per sia popola humuro kaj per sia emo al mallongaj, amuzaj noveloj. Multajn el ĉi tiuj historietoj (plejparte

* El la verkoj de Čapek antaŭe aperis en Esperanto: *R.U.R.* (1926), *La blanka malsano* (1938), *Skizoj pri Nederlando* (1948) kaj *Libro de apokrifoj* (1969).

krimnoveloj) povus rakonti la "bona soldato" Švejk al siaj samarmeanoj.

Sed la aspekto, kiu plej indas je atento, estas la grava rolo de Prago, kiel urbo aŭ kiel mito, en la etoso de la rakontoj. Pri iu novelo komentarias sinjoro Tausig (p. 168): "Ĉi tio ne estis malbona historieto, sed ĝi havas ege grandan mankon: ke ĝi ne okazis en Prago." La pragaj kvartaloj estas la vera, granda temfadeno de la libro, kaŝita en la riĉa varieco de la situacioj kaj en la bunta inventemo de la intrigoj. Preskaŭ ĉiuj historioj okazas en Prago, kaj, en formo de krimnovelo, ĉiu el ili estas inteligenta priskribo de la ĉeĥaj pens- kaj vivmaniero. Se vi ankoraŭ ne havis kontakton kun la granda ĉeĥa literaturo (kun Hašek, Nezval, Kundera, Hrabal k.m.a.), tiu ĉi volumo utilos al vi kiel sprita, inteligenta, amuza enkonduko.

La traduko estas ofte riproĉinda, unue el vidpunkto de sintakso; sed mi konfesas, ke mi tamen tre ŝatis ĝin. Kurioze, ĝuste pro sia manko de rafiniteco ĝi ofte sonas tre taŭga por konversacia formo. Grafike la volumo estas tute akceptebla kaj ankaŭ el tiu flanko ne perfidas la kulturan valoron de la verko.

Mauro Nervi (Italio)

Scio kaj amo en bonega faka libro

Infanpsikologio; Elektitaj temoj, de Margarete Landmark (1916-). Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1978. 10+188p. 30cm. Prezo 22,50 gld.

Jen libro malfacile recenzebla! En ĝi ĉio atingas tiel altan gradon de kvalitoj, ke difektojn oni ne povas trovi. Pri ĉio direndas, ke ĝi estas interesa, kaj tion ripetadi fariĝus ja banale. Mi timas, ke mia recenzo iamaniere velkigu la floron, kiun la aŭtorino, je ĉiu paragrafo de sia libro, klopodas bildigi antaŭ niaj okuloj: la disvolviĝon de infana personeco. Ne nur sian scion ŝi metis en sian verkon, sed ĉefe sian tutan amon al la infanoj.

Kvankam la tro modesta subtitolo de la libro – "elektitaj temoj" – lasas supozi, ke en ĝi oni trovas nur kunkudritajn temojn, male, la idearo celas doni bildon kiel eble plej kompletan kaj diakronan pri la disvolviĝo de la infano, de antaŭ la naskiĝo mem, ĝis la lastaj jaroj antaŭ la adoleskanteco.

La biologiaj donitaĵoj, kiel bazo de disvolviĝo, estas klare emfazitaj, sed neforgesitaj estas la sociaj elementoj, kaj precipe ilia interagado en dialektika procezo. Vere interese estas pritraktita la rolo de la rideto kiel ilo por socia interrilatado (p. 41-47) ĉe tre junaj beboj. Grandan atenton ricevas la teorioj de Freud kaj Piaget. Tamen aliaj, eĉ se malpli gravaj, ne estas preterlasitaj. Apartan pritrakton ricevas la senhejmaj infanoj. Cetere, la aŭtorino ĉiam celas konsideri la infanon ne laŭ universala tipo, sed ŝi provas starigi kiel eble plej kompletan konceptadon, atentante ĉiujn diferencigajn trajtojn: infanoj en tradiciaj socioj, en evolulandoj, en diversaj socitavoloj, en industriaj landoj... Ankaŭ pro tio ŝi meritas grandajn laŭdojn.

Malfacile estas elstarigi tiun aŭ alian ĉapitron en la libro. Samgrade atentokaptaj ĉiuj estas. Tamen, eble pli elstaras la du lastaj, kun la titoloj "Infano ludas". Psikologo iam diris, ke, por infanoj, la ludo estas ilia plej serioza aktivaĵo. Nia libro diras, ke infano "absorbiĝas en ludadon" (p. 161); tamen, la aŭtorino tre bone scias limojn doni je tio: laŭ la civilizoj, kaj laŭ la medioj. Ne ĉie, kaj ne ĉiuj infanoj same ludas je samaj ludoj. Pri tiu temo eble forgesiĝas la libroj de Jean Château en la bibliografio.

Ĉu decas post tiom da laŭdoj, atentigi pri kelkaj etaj dornoj? Malgraŭ la tre oportuna listigo de novaj vortoj fine de la libro, tamen kelkaj tie ne troveblas, ankaŭ ne en PIV: *taktila* (p. 21), *kognitiva* (p. 44 kaj 150), *motoriko* (p. 87). Ĉu vere infano "navigas velŝipon" (p.157) se navigi, laŭ PIV, estas netransitiva? Establiĝi (p. 42) havas en PIV ne tiun sencon, sed signifas komercan aŭ juran starigon.

Tradiciaj estas la kritikoj al la Freuda teoria pri universaleco de Edipo (p. 106-107); tamen malpli ofte citataj estas la kritikoj de tiuj kritikoj fare de Géza Róheim. Pri unu punkto mi tamen ne konsentas, kiam la aŭtorino diras rilate imitadon "la socia integrado...estas nova kiel fenomeno en la psikologio" (p. 50). Ne tiel nova tamen! La libro de Guillaume "La imitado ĉe la infano" estas de 1925, kaj la tiurilataj studoj de Henri Wallon malnovas jam 50-60 jarojn.

Tamen kredu, ke ĉio ĉi vere malgravas. La libro plene konsilindas, kaj legiĝas kiel romano atentokapta. La ampleksa bibliografio liveras la plej freŝdatajn informojn.

Roberto Lloancy (Francio)

Abundas interesaj notoj

Vibraj momentoj; 12 skizoj kun studmaterialo, de Johan Hammond Rosbach (1921-). Oslo: Esperantoforlaget A/S, 1981. 83p. Ilus. 24cm. Prezo: 16,80 gld.

Sur la kovrilo de ĉi tiu libreto estas bildo kun vibre fluganta abelo. La unua rigardo al tiu bildo kaj la titolo *Vibraj momentoj* pensigos kelkajn pri la konataj rakontoj pri abeloj kaj floroj. Ne, ne temas pri longe atendata nova libro de Louis Beaucaire pri "kiel diri al miaj infanoj". Nun serioze: Temas pri kolekto de mallongaj historietoj (kun aldonaj notoj pri gramatiko, stilo, literaturo) por ĝenerala klerigo.

Mi devas konfesi, ke legante la historietojn, mi malmulte spertis tiujn vibrajn momentojn, sed povas esti, ke mia kordo ne taŭgas por tio. Certe la stilo de la rakontoj estas bona, sed la enhavo iom magra. Kontraŭe, la studmaterialo en la notoj estas abunda kaj interesa. La libro certe ne taŭgas por tiuj, kiuj ĵus finis kurson por komencantoj, simple pro tio ke la stilo estas tro komplika. Ni diru, ke por progresintoj ĝi povas servi por instruado .

B. de Wit (Nederlando)

Laste aperis . . .

Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko/Apliko de komputiloj. Red Aleš Bednařík. Žilina: Scienc-teĥnika sekcio de AESSR, 1981. 155+79p. Ilustrita. 29cm. Du volumoj. Kolekto de referaĵoj pri diversaj sciencaj temoj (terminologio, ekologio, konstruado, transporto, elektrotekniko, informadiko ktp) de pluraj aŭtoroj. Prezo: 29,40 gld.

Diroj de Mateo, La, Célestin Freinet (1896-1966). Grupa traduko el la franca. Francio: Grupo de Esperantistaj Edukistoj, 1981 176p. 21cm. Mimeo. Baza verko de la reforma pedagogia movado, kiu portas la nomon de la aŭtoro. Prezo: 19,20 gld.

Esperanto – eine lebendige Sprache: Einführungskurs nach der Metode Midgley (1977). Prilaboris Heinz Dieter Hartig (1927-). Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1981 (2a reviziita eldono). 52p. 21cm. Prezo: 8,10 gld.

Esperanto-movado en Uppsala, La, Karl Söderberg (1903-). Uppsala: Esperanto-Societo, 1981. 56p. 21cm. Mimeo. Historia skizo pri la agado inter 1891 kaj 1980 de unu el la plej malnovaj lokaj Esperanto-kluboj. Prezo: 12,60 gld.

Historio de SAT 1953-1981. Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1982. 32p. 21cm. Kompletigo de samtitola verko aperinta en 1953. Prezo: 2,40 gld.

Imaga dialogo Marks/Bakunin (1926), Maurice Cranston. El la angla trad. D.C. Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1982. 32p. 21cm. Prezo: 2,40 gld.

Komenský: **Granda instruisto de la nacioj; La vivo kaj laboro de Jan Amos Komenský**, H.K. Bouška. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1981. 45p. 22cm. Mimeo. Prezo: 2,70 gld.

Lernejoj de Winnetka, La, A. da Silva. El la portugala trad. J. de Freitas Martins. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 23p. 21cm. Mimeo. Pri edukaj reformoj en malgranda usona urbo en 1919. Prezo: 1,20 gld.

Lupeuloj, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1981. 102p. 17cm. Mimeo. Aforismoj, rakontetoj. Prezo: 4,50 guldenoj.

Mallonga historio pri Respubliko San Marino, G. Rossi. El la itala trad. Catina Dazzini (1917-). Resp. San Marino: Ministerio pri Publika Instruado kaj Kulturo. 84p. 17cm. Prezo: 3,00 gld.

Manifesto de Ventotene, E. Rossi kaj A. Spinelli. El la itala trad. U. Broccatelli. La tradukinto: 1981 (ne indikita). 21p. 28cm. Mimeo. Kontraŭmilita teksto el 1941/42, kiu pledas por unueca Eŭropo. Prezo: 6,00 gld.

Nudpieda Gen, Keizi Nakazawa. Trad. el la japana Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen , 1982. 4+284p. 21cm. Bildstria romano pri la familio Nakaoka, kiu spertis la unuan eksplodon de atombombo super Hiroŝimo en 1945. Unu el la plej famaj kontraŭmilitaj kaj kontraŭnukleaj libroj en Japanio, kie ĝi estas ankaŭ filmita kaj operigita. Bele eldonita, ĝis nun la plej ampleksa bildstria libro en Esperanto. Prezo: 30,00 gld.

Oklingva nomaro de eŭropaj birdoj, Béla Mészáros. Debrecen: 1980. 140p. 28cm. Mimeo. Terminaro kun birdonomoj en jenaj lingvoj: angla, ĉeĥa, Esperanto, germana, hungara, latina, pola kaj rusa. Prezo: 12,90 gld.

Psikotransformismo. Bonaero, 1981 (ne indikite). 56p. Mimeo. 17cm. "Por nova maniero de pensado". Prezo: 7,50 gld.

Rakontoj de velkinta folio, Vasilij Eroŝenko (1890-1952). Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 73p. 18cm. Dulingva (Esperanto-ĉina) eldono. Prezo: 3,60 gld.

Simioj provas elakvigi la lunon, Xia Xia. El la ĉina tr. Liu Ling. Beijing: Ĉina Esperanto-Ligo, 1981 (3a eld.). 16p. Kolorilus. de Wan Laiming. 26cm. 88-Es-61P. Du ĉarmaj rakontoj pri simioj. Prezo: 2,40 gld.

Strangled Cries, Julius Balbin. El Esperanto en la anglan trad. Charlz Rizzuto. Merrick (New York): Cross-Cultural Communications, 1981. 24p. 22cm. Ses poemoj originale verkitaj en Esperanto. Dulingva eldono. Prezo: 12,90 gld.

Tutmonda sonoro, Kálmán Kalocsay (1891-1976). Red. V. Benczik (1945-). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 664p. 20cm. Bindita. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 17. Du volumoj. ISBN 963 571 091 7. Antologio de tutmonda poezio (581 poemoj de 185 poetoj). Ĉefverko de la traduka beletro en Esperanto. Prezo: 66,00 gld.

Verda relo, La; Beletra antologio pri la fervojo. La Chaux-de-Fonds: Literatura Foiro, 1981. 66p. 21cm. Poemoj kaj prozaĵoj, originalaj kaj tradukitaj, de diverslandaj aŭtoroj. Prezo: 22,50 guldenoj.

Warum Esperanto? Wien: Österreichisches Esperanto-Institut, 1981. 64p. 21cm. Dek tri artikoloj, iuj tradukitaj el Esperanto, pri la internacia lingvoproblemo kaj ties solvo per Esperanto. Arthur Baur, Claude Piron, Tibor Sekelj k.a. Prezo: 4,50 gld.

Diversaĵoj:

Gluafiŝo "Atomenergio? Ne dankon". Ronda, diametro ĉ. 13cm., flava kaj ruĝa. Prezo: 1,20 gld.

Karnavaleto. Kantas Olivier Tzaut. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop, 1981. Gramofondisko (30cm., 33t/m) aŭ kaseto 34-minuta. Dek kantoj, tradukitaj kaj originalaj, de Claude Piron kaj aliaj. Kun kantotekstoj. Prezo: 25,80 (kaseto); 31,80 (disko) gld.

Komputilo proksimiĝas al homo, La. Redaktis Internacia Grupo Informo-Scienca. Budapest: HEA, 1982. Kaseto 60 min. Kvar prelegoj de B.A. Sherwood, H. Frank, J.O. de Kat kaj A. Münnich. Prezo: 18,00 gld.

Vi alta libera. Kantas Kiruna Motet-Ĥoro. Malmö: Eldona Societo Esperanto kaj E-klubo Kiruna, 1982. Kaseto 20-minuta, kun dek belaj svedaj kantoj. Kantotekstoj aldone. Prezo: 12,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭđankon pro via mendo!

LIBERTÉ OU AUTORITÉ DANS L'ÉVOLUTION DE L'ESPÉRANTO

Finfine. . . aperis la Sorbona disertacio de François LO JACOMO pri *Libereco kaj aŭtoritato en la evoluo de Esperanto*, sub la gvidado de André Martinet, defendita la 28an de junio pasintjare, franclingva, kun resumo en Esperanto.

384 paĝoj, formato 17x24cm. Prezo: 90 francaj frankoj (plus 15% por afranko aŭ 25% por aera sendo. Rabato ekde 3 ekz. Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 39,00 guldenoj.

Eldonis: François LO JACOMO, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris.

TEJO-paĝo

LABORTENDAROJ:

Por esti utila kaj lerni

FINE DE MARTO la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO eldonis katalogon pri labortendaraj aranĝoj okazontaj en 1982. La okpaĝa informilo aperis en Esperanto, en la angla, franca kaj (kiel eldonaĵo de Nederlanda Esperanta Junularo) en la nederlanda. Ĝi do ne nur invitas esperantistajn gejunulojn al malmultekostaj ferieblecoj, sed precipe la t.n. eksteran mondon. Kvankam TEJO celas instigi neesperantistojn komenci lerni Esperanton en la agrabla etoso de tiaj tendaroj, kie oni povas ne nur lerni kaj amuziĝi, sed ankaŭ fari iun utilan laboron, ĉi-jare nur relative malmultaj tendaroj ofertas Esperanto-kurson por komencantoj. Pro tio la informilo ankaŭ atentigas pri kelkaj alispecaj E-kursoj en Japanio, Usono, Francio kaj Svislando.

La mankon de kursoj en labortendaroj kaŭzis la fakto, ke troveblas nur malmultaj homoj, kiuj pretas instrui la lingvon en tia tendaro. S-ro Chareille, la organizanto de la neesperantista labortendaro La Muelejoj de Metilernantoj (Francio), ekzemple, proponis al TEJO organizi kursojn en sia tendaro dum la tuta somero. Se vi interesiĝas tie aŭ aliloke instrui Esperanton, kontaktu H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

La katalogo *Labortendaroj 1982* volas atentigi pri aparte interesa ebleco lerni kaj apliki Esperanton. Eble ankaŭ aliaj landaj sekcioj de TEJO, simile al tio kion faris Nederlanda Esperanta Junularo, adaptos la katalogon por la uzo en siaj landoj. Mendu vian propran ekzempleron kontraŭ unu irpk. ĉe TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo.

Martin Haase

LANDAJ SEKCIOJ:

Duafoje estos pli bone

GEJUNULOJ de Korea Esperanto-Asocio lastatempe denove montras, ke ili estas la plej aktiva parto de la Movado en tiu azia lando. Por plifortigi siajn lingvajn kaj movadajn sciojn kaj prepari sin por komuna seminario kun japanaj junaj esperantistoj en aŭgusto, Korea Esperanto-Junularo okazigis la 16-17an de januaro seminarion en la urbo Deĝon.

Aldone al la amuziĝo, kutima en junularaj kunvenoj ĉiulandaj, la 35 partoprenantoj de la seminario aŭskultis plurajn prelegojn movadajn kaj nemovadajn. Precipe atentinda estis la prelego pri "La lingva problemo en Unuiĝintaj Nacioj", kiun faris s-ro Bak Gi-ŭan, prezidanto de KEJ.

Ĉi tiu unua seminario de Korea Esperanto-Junularo estis bone planita. Ankaŭ la programo kaj pluraj amuzaj eroj (danchoroj de la unua vespero, dumnokta kantado, prezento de originalaj Esperantaj kantoj de Son Ho-ĉol) kaj la interesaj temoj de la prelegoj certigis, ke la partoprenantoj ne foriris malkontentaj. Tamen, verŝajne pro la fakto, ke al la prelegantoj mankis sperto en la publika uzo de la lingvo, estiĝis sento (krom pri la prelego de Bak Gi-ŭan), ke la prelegantoj estus povintaj prepari sin pli bone. Post ĉi tiu valora sperto, oni esperas, ke la dua enlanda seminario de KEJ estos eĉ pli bona.

psh

DENOVE ESTAS HAVEBLA ĈI TIU POPULARA LERNOLIBRO!

Ĉu vi parolas tendare?, de Renato Corsetti kaj Mauro la Torre. Roterdamo/Sarajevo: TEJO/Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980 (3a eld., fotoreprese). 64+27p. Ilus. 20cm. Prezo: 5,10 gld. Triona rabato ĉe la Libroservo de UEA ekde minimume 3 ekzempleroj.

38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, 1982 07 31 – 08 07, Leuven (Belgio)

Adreso: 38a IJK, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio

UK por IJK

LA PREPAROJ por la 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO progresas bone. Ankaŭ la aliĝoj estas multnombraj, kvankam – kiel kutime – granda parto de la gejunuloj decidiĝos nur lastmomente, ĉu iri aŭ ne iri al Loveno. Por rapidigi tiurilatajn decidojn, ni volas ripeti ĉi tie informon, kiu eventuale povus influi vian pretecon aliĝi:

Ĉiu junulo malpli ol 26-jara, kiu aliĝas al la 38a IJK, rajtas senpage partopreni la 67an Unversalan Kongreson en Antverpeno, semajnon pli frue. Antaŭ ol oni faris tiun decidon, pluraj gejunuloj jam aliĝis – kaj pagis – al la UK. Kion nun fari en tiaj kazoj? Ĉu ili rajtas rehavi siajn UK-kotizojn? Jes, ili rajtas. Necesas nur skribi pri tio al la konstanta adreso de UK (ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo). Kial necesas skribi? Nu, ĉar la kongresa administracio ne ĉiam estas informita pri la aĝo de la aliĝintoj al UK. Memoru tamen, ke ĉi tiu senpaga aliĝo al UK rilatas ne ĉiujn partoprenontojn en IJK, sed nur tiujn, kiuj estas malpli ol 26-jaraj.

Loke

Jordanio

• Jordana radio elsendis en januaro 1982 dufoje 30-minutan programon pri Esperanto. Temis pri intervjuo kun la usona esperantisto Jimmie Osburn, kiu pasintjare translokiĝis al Jordanio. S-ro Osburn parolis pri Esperanto ankaŭ en la Usona Kultura Centro de la jordana ĉefurbo Amano. Li planas prelegojn en la universitatoj de Amano kaj Irbid. Ĝis nun en Jordanio apenaŭ ekzistis parolantoj de la Internacia Lingvo. Kontaktadreso: s-ro Jimmie Osburn, AID, Box 354, Amman, Jordanio.

Ĉeĥoslovakio

• Preskaŭ 400 personoj partoprenis la 4an Kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Pardubice, inter la 19a kaj 23a de marto 1982. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de la ĉeĥa kulturministerio kaj gastoj el ok landoj.

Jugoslavio

• Laŭ la nacilingva informilo de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, en Banja Luka – grava industria kaj eduka urbo meze de la lando – pasintjare fondiĝis 12 Esperanto-kluboj, tiel ke la urbo nun havas 16 agadgrupojn por Esperanto. Du el tiuj kluboj estas en fabrikoj, tri en la loka universitato, sep en mezlernejoj ktp. La urbo ĉi-jare subtenas ankaŭ finance la Esperanto-agadon per subvencio de cent mil dinaroj (ĉ. 5 700 gld).

Japanio

• Japana Esperanto-Instituto jam de kelkaj jaroj forgesas liveri al ni informojn pri la ĉefa jara kunveno de la japana esperantistaro. Tial mankis informo pri la ĉi-jara Japana Kongreso de Esperanto en nia rubriko "Kalendaro" en la marta numero. Ni nun eksciis, ke la Kongreso okazos la 28an kaj la 29an de aŭgusto en la urbo Kamakura. Laŭ la nunaj planoj ŝajnas, ke la Kongreson partoprenos ankaŭ d-rino Flóra Szabó-Felsö, ĝenerala sekretario de UEA.

Madagaskaro

• Madagaskaro estas la sola afrika lando en kiu la Internacia Lingvo havas relative firmajn radikojn. Eĉ se ofte okazas malfacilaĵoj orientiĝi en la svarmo de diversaj nomoj de la tieaj "tutlandaj" organizaĵoj movadaj, ankaŭ bonaj novaĵoj foje venas el tiu lando: ĵus aperis 40-paĝa *Vortareto Esperanta-malagasa*, kiun verkis s-ro Rakotondravao kaj eldonis la Fondaĵo Azio-Afriko de UEA.

Fake

Jubilea Jaro

• La 1-an de aprilo, en Bruĝo (Belgio), okazis kelkhora renkontiĝo inter prof. d-ro Ivo Lapenna kaj s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA. Temis ĉefe pri provoj kunordigi la agadojn rilate la Jubilean Jaron 1987. Tiurilate estas interkonsentite, ke la 30an de majo ĉi-jare en Münster (FR Germanio) okazu kunveno de reprezentantoj de ĉefaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Aparta invitilo (kun tagordo) estas dissendita por tiu kunveno, kiu okazos en la kadro de la 60a Germana Esperanto-Kongreso (28a–31a de majo).



• Aŭstralio: Ralph Harry, membro de Honora Patrona Komitato de UEA kaj prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio, decidis ĉi-jare viziti sian movadan "regnon". Li planas veni al la Kongreso en Antverpeno, sed antaŭ tio li vojaĝas tra la vasto de la aŭstralia kontinento. Jen li (maldekstre) inspektas la Esperantan kolekton en la biblioteko de la Universitato Murdoch en Perth. S-ro Harry antaŭ nelonge iniciatis la fondiĝon de Aŭstralia E-Biblioteko en Canberra.

Volontula Servo de UEA

• Meze de marto ĉi-jare Roterdamon forlasis s-ro Hisasi Kitagawa, 21-jara japana studento pri sociologio, kiu pasigis naŭ monatojn kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA. Li ĉefe okupiĝis pri la laboroj en la Libroservo de UEA. Kitagawa estis la unua azia volontulo de UEA. Ekzistas eblecoj, ke post la Kongreso en Antverpeno en la Centra Oficejo restadu ĉina kunlaboranto, kun ĉefa celo spertiĝi pri la kongresaj organizaj laboroj. En majo, ĉe UEA eklaboros kataluna volontulo.

Informado

• Radio Pekino sendos ĉi-jare specialan raportiston al la 67a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno. Estas unuafoje, ke el Ĉinio venos al UK aparta ĵurnalisto por sekvi la kongresajn laborojn. En la antaŭaj jaroj simile agis nur Pola Radio kaj kelkfoje Radio Zagreb.

Sporto

• Internacia Sporta Simpozio, kiu sub la aŭspicio de UEA okazos en Madrido inter la 8a kaj 11a de julio ĉi-jare, havos kiel honoran prezidanton Lian Moŝton Juan Carlos I, la Reĝon de Hispanio. La Honoran Komitaton eniris ankaŭ du ministroj kaj pluraj aliaj eminentuloj de la lando. La ĉeftemo de la Simpozio estos "La sporto en la moderna socio". La Simpozio okazas lige al la ĉi-jara Monda Futbala Ĉampioneco en Hispanio. La organizanto de la Simpozio estas Madrida Esperanto-Liceo, Atocha 98-4°, Madrid 12, Hispanio; telefono: (34 1) 230 87 98.

Periodaĵoj

• La entreprenema Kooperativo de Literaturo Foiro (Svislando) lanĉis antaŭ nelonge plian periodaĵon – *Planlingvistiko*. Laŭ la subtitolo, temas pri "trimonata revuo por la studo de planlingvoj". En la numeroj 0 kaj 1 troviĝas kontribuaĵoj de T. Carlevaro, B. Golden, I. Szerdahelyi, P. Daŝgupto, J. Linstedt (redaktoro de la nova periodaĵo) k.a., ĉefe pri esperantologiaj temoj. Grafike senpretenda, la nova revuo trovas sian ekzistokialon ĉefe en tio, ke la planoj de CED revivigi la iaman *Esperantologio* ankoraŭ restas nur planoj. *Planlingvistiko* estas abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA (15,60 guldenoj; por Nederlando: 16,22).

Personoj

Bakin

• Bakin, fama ĉina verkisto kaj esperantisto, membro de Honora Patrona Komitato de UEA, ricevis la Internacian Dante-Premion por la jaro 1982. Temas pri nova, prestiĝa internacia rekono, kiun atribuas Itala Akademio de post 1979. Bakin estas la kvara gajninto de la Premio, kiu antaŭe iris al Leopold Senghor (Senegalio), Pietro Scanziani (Svislando) kaj Vintila Horia (Rumanio). Pasintjare Bakin estis en la supro de la listo de kandidatoj por la Nobel-Premio pri literaturo. Kiel konate, Bakin estris la ĉinan delegacion en la 65a UK en Stokholmo antaŭ du jaroj, kiam aperis en Esperanto lia romano *Aŭtuno en la printempo.* En la eldonplano de Ĉina Esperanto-Ligo ĉi-jare troviĝas *La familio*, unu el la ĉefverkoj de Bakin.

Llech-Walter

• La 28an de marto ĉi-jare, en Perpignan (Francio), s-ro René Llech-Walter solene promociiĝis al la rango de Komandoro en la ordeno de Akademiaj Palmoj. Temas pri la plej grava distingo de Eduka Ministerio de Francio. S-ro Llech-Walter (dekstre sur la foto) estas unu el la plej konataj kulturaj agantoj inter katalunoj en Francio. Li estas ne malpli konata pro sia pli ol 50-jara agado por Esperanto, pro kio li fariĝis i.a. honora prezidanto de Franca Unuiĝo por Esperanto.

Bartelmes

• La marta numero de *Sennaciulo*, oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), estas la lasta kiu aperis sub la redaktora nomo de Norbert Bartelmes (1897-). Tiel eksiĝas verŝajne la absoluta rekordulo inter la movadaj ĵurnalistoj. Bartelmes ekredaktis la monatan gazeton de SAT jam en 1924 kaj kun kelkaj malgrandaj interrompoj, ĉefe lige al la Dua Mondmilito, redaktis ĝin ĝis nun. Li ankaŭ tradukis kaj originale verkis en Esperanto. Bartelmes ne tute retiriĝas el la Movado al kiu li dediĉis sian tutan vivon (li lernis Esperanton en 1911), kaj li restos redaktoro de la jara kajero *Sennacieca revuo.* La nova redaktoro de *Sennaciulo* fariĝis Krešimir Barković(1944-), jugoslavo, jam de pluraj jaroj oficanta ĉe SAT.

Oficiala Informilo

N-ro 552

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Japanio: Yasuhiro Nisi.

SOCIETO ZAMENHOF 1982

Belgio: Grégoire Maertens. Brazilo: Carlos H. Dionísio. Kanado: Wilfred Settle. FR Germanio: Helmut Klünder; Ruth Paintner-Trumpp; M. von Waldowski. Francio: Eija-Liisa Chevalier; Odette Bernet. Britio: Wilfrid G. Atkinson. Italio: Michele Mariano. Norvegio: Kjell Gustavsen; Olaf Maeland. Nederlando: A.M.E. van Walsem-Schutte; B. Kappert; J.S. Rooke; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; W. Spaander. Argentino: Luis Martínez Ungría. Svedio: Maja Ahlström; Amy Nilsson; Gurli Nylin; Jim Hornö. Finnlando: Harri Tuomola; Niilo Kavenius. Usono: B.J. Balcar; Julie M. Dinnel; Doris Vallon; Eugene H. Thompson Jr.; Gigi Harabagiu; William P. Ledeen. Jugoslavio: Neven Kovačić.

Entute ĝis nun 170 membroj.

DONACOJ 1982 (Gld.) ĝis la 28-a de februaro

FONDAĴO CED: Nov-Zelando: NZEA 40,80.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: W.A. Verloren van Themaat (por Zairio) 50,00. Sumo ĉi-jara 54,42.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nordlandano 197,70.

ĜENERALA KASO: Usono: E.H. Thompson Jr. 76,80. Sumo ĉi-jara 581,20.

NOV-JORKA OFICEJO: **Patronoj** (minumume $100): Aŭstralio: E.C. Tronerus; Esperanta Ligo de Okcid. Aŭstralio; L.V. Scott; Vera Esther Payne. Kanado: Janet Warren. FR Germanio: Bruno Vogelmann; Rondo por Parolspuro; Hermann Scheffler; Heinrich Nischwitz; Wilhelm Treude. Japanio: Kenitiro Doi; Seiti Eto; Tomiko Ikeda; Bun'iti Isizaki; Teiiti Kikuti; Kimiharu Kimura; Sin'itirô Kawamura; Keniti Matumoto; Sintaro Miyamoto; Tadasi Sakai; Norio Masamoto; Hideo Sinoda; Tosihide Kuwahara; Tomô Nakayama; Toyozo Nisikawa; Rokurô Turuno; Tadao Yosida. Nederlando: Institucio Hodler '68. Finnlando: Touko Tähtinen; Tapio Sormunen. Usono: Allan C. Boschen; Julie M. Dinnel; Eugene H. Thompson Jr.; Bernice Garrett; Jaqueline T. Reynolds; Mack Dougherty; Ralfo M. Murphy; Mark Starr; W. Campbell Nelson; Yul Bal-

bin. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich. **Subtenantoj** (min. $25): Aŭstralio: Owen Loneragan. Kanado: B. D. Kaneen. FR Germanio: Esperanto-Grupo Aachen; Christie Spruch; Frank Selten; Erhard Herlitze; Theodor Kraft; Hans-Dietrich Quednau. Francio: François Lo Jacomo. Japanio: David MacGill; Fuĵio Egami; Humio Eguti; Yasusi Huzita; Tosio Hakamada; Kenzo Hamada; Fumio Inumaru; Takasi Isikawa; Seiiti Kato; Kazuko Kikusima; Eizi Kimura; Yasuyosi Kitawaki; Utako Kobayasi; Siro Koga; Hitomi Kitabatake; Toyohiko Manabe; Niiti Matano; Mosuke Morita; Singo Mori; Masami Murakami; Sizuo Nakamura; Ôki Nakayama; Kazuo Nakazato; Sigekazu Nisimiya; Rihei Nomura; Itaru Ôba; Rinzô Okumura; Kazuo Ôsaki; Syôzi Sakamoto; Katuya Sumiyosi; Koiĉi Ŝimizu; Yosio Sugimoto; Takeo Sugano; Hideo Takubo; Hirosi Takeda; Rintaro Taki; Naoki Toida; Takao Ôhara; Masao Tuda; Sigeru Tugu; Masao Ueda; Yosimi Umeda; Ryoozi Ura; Eiiti Uruga; Yosi Yamamura; Yonemi Maeda. Nov-Zelando: Rita Aagaard; S.H. Dodds. Finnlando: Asko Kyttä; Irja Klemola; Esperanto-Grupo "Antaŭen". Usono: Rose Norlund; Solomon D. Helfgot. **Amikoj** (min. $10): Aŭstralio: M. Rozsa; T. Elliott. Kanado: Kirk Crockett. FR Germanio: August Weide; Astrid Hanke; Erwin Melle; Erich Schauss; Kurt Franzek; Herbert Busch; Helga Erhard; Hans-Walter Krüger; Hella Lanka; Hermann Teichmann; Hellmuth Hübler; Josef Fischer; Joachim Giessner; Kurt Aschbrenner; Klaus Schlüter; Maria Vitályos; Manfred Westermayer; Esperanto-Grupo Nürnberg; Richard Wluka; Rudolf Kratzmann. Francio: Eliane Lo Jacomo. Italio: Gruppo Esperantista Trentino; Renata Bovicini. Japanio: Sigeru Aosima; Harukuni Egawa; Minosuke Emori; Takasi Endô; Yosihiko Hasiguti; Masaki Imai; Iwao Hirata; Zun'iti Sibayama; Ĵunsuke Takase; Aizô Kainuma; Takasi Kawai; Matazi Kido; Tadazo Kinosita; Syozi Kitagawa; Kozi Nakada; Kiuya Komamura; Yosio Koseki; Tomoko Matoba; Makiko Hukunaga; Kenzen Minami; Anselmo Matubara Hatirô; Zirô Nagaoka; Eizi Nakamura; Tameo Nitta; Tosiyuki Ôsima; Tadasi Saka; Takamaru Sasaki; Syozi Hosonuma; Mutuko Takesaki; Sigenori Takeuti; Kiiti Zimbo. Nov-Zelando: Jeannie Wilson. Svedio: Henrik Karlsson. Finnlando: Hemmo Tietti; Veera Tietti. Usono: Abraham Lin; Apollo Wu; Donna R. Stitz; José Hackenberg; Ernest E. Kovary; Lura R. Chapman; William J. Mets; Mark Mensch; Manda Tata; Ralph A. Orsi.

PATRONOJ DE TEJO: 35 H.M. Schippers, Nederlando. 36 R. Corsetti, Italio. 37 M. Angel Altuna Aspiazu, Hispanio. 38 E.E. Mallett, Britio. 39 J.S. Douma, Nederlando. 40 W.H. Mook, Nederlando.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**



HIERAŬ HODIAŬ MORGAŬ noveloj

Bernard Golden, usonano kiu iam vivis en Afriko, kaj nun rezidas en Hungario, havas multon interesan por diri al la legantoj. Li verkas simple kaj klare, en perfekta Zamenhofa lingvo. Pluraj el la 12 noveloj en lia unua libro estas premiitaj en la Belartaj Konkursoj.

Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ; Noveloj, Bernard Golden (1925 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 96p. 21cm. ISBN 90 6336 022 3. Prezo: 12,00 guldenoj.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblas ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk. 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr. Kasedo: 20 sv. fr. Vendas ankaŭ UEA.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

ESPERANTO-DOKUMENTOJ estas la sola movada serio destinita unuavice por la informado de nemovada publiko. Ĝis nun aperis trideko da kajeroj en la angla, 15 en Esperanto, kaj 10 en la franca. Pro la ampleksiĝo de la preparaj laboroj, por pli efike serĉi novajn temojn kaj aŭtorojn, por siavice intensigi kaj rapidigi la aperritmon de la serio, UEA decidis serĉi apartan

REDAKTORON DE "ESPERANTO-DOKUMENTOJ"

Se vi havas bonan konon de la lingvo kaj Movado, se vi disponas pri iom da spertoj en la sfero de esploroj kaj dokumentado kaj se vi pretas helpi al UEA ĉi-maniere, petu pliajn detalojn de: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono.

Sija van Wijngaarden havas novan adreson: Dr. de Visserstraat 99, 3038 TN Rotterdam.

"La verko plej grava, kiu aperis en kaj pri Esperanto dum la pasintaj dekoj da jaroj." (T.P., Britio.) Prezo: 21 francaj frankoj. Ligue Française "Pro Unesco" (24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse). Poŝtĉekkonto 16.233.37 C Paris.

Stanisław Idzior (1928-1982), edzo de E-kluba prezidantino Elżbieta en Bielsko-Biała, Pollando, simpatianto kaj subtenanto, mortis la 5-an de februaro.

Volapük-literaturo serĉata. Ofertojn al: SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

El Popola Ĉinio: Postulu senpagan specimenon de Guoji Shudian, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Baldaŭ mi fariĝos 80-jara, sed mi estas juna kaj malfermita al ĉiuj nuntempaj problemoj. Mi estas la plej malnova revuo daŭre aperanta en Esperanto: *Espero Katolika*, fondita en 1903. Ĉiujare almenaŭ 200 paĝoj kun multaj fotoj, jarabono 22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Specimeno ricevebla senpage ĉe: IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Feria interŝanĝo Danlando — Suda Francujo: Dana familio kun du infanoj serĉas domon aŭ loĝejon en Suda Francujo. 10a — 24a aŭ 3a — 24a de julio. Interŝanĝe kun moderna domo en Aarhus, la dua urbo de Danlando. 7km al bonega strando. Bela ĉirkaŭaĵo. Multaj vidindaĵoj. Centra situo por ekskursoj al cetera Danlando. Fotojn kaj pliajn informojn sendos Lizze kaj Erik Schleicher, Skovgaardsvænget 612, DK-8310 Tranbjerg, Aarhus, Danlando.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj: Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, D-7500 Karlsruhe 21, F.R. Germanio.

Somerumi apud la adriatika marbordo: En belega parto de la adriatika marbordo, inter Split (17km) kaj Omiš (6km), ĉe la marborda aŭtovojo, je 100m de la maro, vi povas ferii en esperantista rondo. En ĵus finkonstruita domo, mi ludonas ĉambrojn (laŭ interkonsento: kun kuirejo). Ĉiuj interesitoj bonvolu anticipe skribi al: Davor Grgat, Paićeva 21, YU-58000 Split, Jugoslavio. Telefono: (058) 512 565.

Du blindaj junulinoj, ambaŭ 25-jaraj, kolektas poŝtmarkojn por aĉeti legmaŝinon kaj perfektigi sian scion de Esperanto. Ankaŭ vi povas helpi sendante iom da uzitaj poŝtmarkoj en bele afrankita koverto al: f-ino Gina Kerr, 10/9 Picot St., Kelvin Grove, Qld. 4059, Aŭstralio, aŭ al: f-ino Jenny Finch, P.O. Box 152, Woolloongabba, Qld. 4102, Aŭstralio. Eblas rekompenco per aŭstraliaj poŝtmarkoj kaj Esperanta korespondado en la brajla skribo.

René Guignot, Oyonnax, Francio, deziras scii novan adreson de Dagmar Lind, Linköping.

Mi kolektas "unuajn lernolibrojn de legado" el malsamaj landoj. Ĉu vi povas helpi min? (Anoncrepreso petata.) S-ino Sonja Holmedal, Tegelvägen 4c, S-611 50 Nyköping, Svedio.

Esperanto en radio

La kompleta tabelo pri la radioelsendoj aperis en nia novembra numero, kaj ni planas aperigi ĝin denove en junio. Informojn pri Esperanto en radio sendu al la rubrikredaktoro: s-ro G. Larglantier, 29 bd. Murat, F-75016 Paris.

HUNGARA RADIO. Post kontentiga provo pasintan jaron, la radiostacio en Pécs disaŭdigos someran programon por turistoj ĉiun vendredon de la 4a de junio ĝis la 27a de aŭgusto inter 16.25 kaj 16.30 GMT (18.25 - 18.30h en Hungario). Ĝi estos kaptebla sur ondoj 344m (873 kHz) kaj 67.19 MHz en la sudo de la lando kaj parto de norda Jugoslavio. La programo entenos informojn pri vetero, trafikaj cirkonstancoj, kulturaj kaj aliaj vizitindaĵoj. Leteroj de aŭskultantoj estos bonvenaj al Radio Pécs, Esperanto-programo, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

RADIO PEKINO. Samaj horoj, sed ekde la 21a de aprilo novaj ondolongoj: 11.00 - 11.30, 30.10m (9965 kHz), 26.21m (11445), 19.80m (15150) por orienta Azio; 13.00 - 13.30, 19,78m (15165), 16.91m (17745) por sudorienta Azio; 20.00 - 20.30, 30.10m (9965), 26.21m (11445), 19.80m (15150) por Eŭropo; 22.30 -23.00, 26.06m (11515), 19,78m (15165) por Ameriko.

RADIO ROMA. La sabata programo de 20.00 ĝis 20.20 estas nun dissendata per ondoj 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz).

POLA RADIO. Post trimonata interrompo la ĉiutagaj elsendoj denove okazas, kiel antaŭe kun la jenaj konstantaj programeroj: lunde: Aŭskultantoj por aŭskultantoj; marde: Trarigardo de la Esperanto-gazetaro aŭ DX-klubo alterne; merkrede: El la vivo de PEA; ĵaŭde: Leterkesto; vendrede: Pollando hodiaŭ; sabate: Panoramo de internaciaj eventoj, Semajno en Pollando, Esperanto-ekspreso; dimanĉe: Esperanto-ekspreso, Semajno en Pollando; krome ĉiutage: diversaj informoj naciaj kaj internaciaj. Raportoj pri aŭskultado estas bonvenaj kaj sendotaj al: Radio Polonia, Esperanto-redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

Ekonomia Bulteno pri Usono

Ĉu vi ankoraŭ ne abonis?
ABONU NUN!
Jarabono US $10 (12 numeroj)

Adreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, Usono

Abonebla ĉe UEA: 25,00 gld.
Provekzemplero 2 irk.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

FABELOJ DE LA VERDA PIGO

Kolektitaj de Louis Beaucaire

Ĉiu popolo havas sian fabeliston: la danoj H.C. Andersen, la germanoj la fratojn Grimm, la francoj La Fontaine ktp. ktp. . . La esperantistoj nun havas Louis Beaucaire! Ĉu vi miras, ke lia tria libro, kvankam aperinta nur meze de la pasinta jaro, jam estis en la listo de la pleje vendataj libroj en 1981? **Fabeloj de la verda pigo**, 112 paĝoj, el kio duono estas ilustraĵoj. Prezo: 19,80 guldenoj.

Eldonejo TK/Stafeto
Miksebaan 65A
B-2130 Brasschaat
Belgio

MODERNA KROATIA PROZO

NOVA ANTOLOGIO

34 noveloj de modernaj kroatiaj verkistoj. 604p. Tole bindita. 20x15cm. Prezo: 58,50 guldenoj.

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, kaj Edistudio, Pizo, Italujo.

ELDONEJO MOUTON
Filio de Walter de Gruyter & K-io
anoncas la aperon de la anglalingva verko

THE ESPERANTO MOVEMENT

de D-ro Peter Glover Forster

Ĉi tiu bonega libro estis antaŭrecenzita jene:

". . . de la plej alta scienca nivelo. . . ĝenerala sociologia verko pri Esperanto kaj ties historio. . . ĝi fariĝos normiga verko sur sia kampo." **V.G. Pons, profesoro pri sociologio, Universitato de Hull, Britio.**

"Ĝi estas. . . ne nur unika sed ankaŭ tre bone farita, ĝisfunda kaj stimula. . . pionira kaj bone verkita. Ĉi tio estas la unua studo de la monda movado ĝenerale. . ." **Prof. Joshua A. Fishman, Universitato Yeshiva, Nov-Jorko.**

". . . Mi havas altan opinion pri ĉi tiu libro. Ĝi alportas enrigardojn . . . de speciala intereso por la membraro de la Esperanto-movado." **D-ro Ulrich Lins, DAAD, Tokio.**

THE ESPERANTO MOVEMENT, Peter G. Forster. Hago/Nov-Jorko/Berlino: Mouton/Walter de Gruyter, 1982. XIV+413p. 23cm. ISBN 90 279 3399 5. Prezo: DM 30,00 (33,90 gld).

Viajn mendojn sendu rekte al: **Walter de Gruyter & Co. Postfach 11 02 40, D-1000 Berlin 11** aŭ al: **Libroservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.**

Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

fondaĵo Azio-Afriko

Tiun nomon vi renkontas ĉie...

KLM Boeing 747 survoje.
Al Usono, Aŭstralio, la Malproksima Oriento; al unu el la 120 urboj en 75 landoj. Multaj homoj senhezite mendas lokon ĉe KLM.

Kompreneble, ĉar inspiras fidon gasti ĉe via aviada kompanio. Vi povas esti certa ke vi flugas en moderna aviadilo. Perfekte kontrolata kaj direktata de personaro kiu estas 100%-e preparita por sia tasko. Agrabla penso. Dum la vojaĝo vi povas fidi je la KLM-servado kaj la kabina stabo estas je via dispono.

Ĉe KLM vi simple estas hejme. Kien ajn vi flugas. Kie ajn vi estas, tra tuta mondo ja troviĝas pli ol 300 oficejoj.

Jes, tiun nomon vi renkontas ĉie.

KLM